

300–399 paŝoj – 52 baladoj

& Duelo:	150	& Vokto kaj servistino:	189
& En sun' tri knabinoj:.....	152	& Inter ĉiuj plej feliĉa ul':	191
& Dueto por violon' kaj aldo: .	153	& Protestaj voĉoj:.....	193
& Jen Rhodos:	154	& La ovoj:	195
& La leono, la vulpo kaj la azeno:	155	& Kion ni faru al ebrulo:.....	196
& Lidja balado:.....	157	& Kudristo kaj bopatrino:	197
& Sur unu kordo. (Defendo de l' rimo):	159	& Vento kaj suno:	199
& Anĉar':.....	161	& Vojaĝo al Oriento:.....	201
& Danco de skeletoj:	163	& La glorkanto al UEA:.....	202
& La ranoj volas reĝon:	165	& 1905:.....	203
& Kaj en Raduno:	167	& Gala epistolo:	205
& Novaj kondiĉoj:	168	& La simio kaj la delfeno:.....	207
& Ho granda Dio:	170	& Revina:	208
& Marista lulkanto:.....	171	& Hermes kaj la lignohakisto: 209	
& Ruĝa flago:	172	& La aglo kaj la vulpo:.....	211
& La kampulo kaj la vulpo:	173	& La lasta fablo de Ezopo:.....	213
& Kobolda julkanto:	174	& La prognozo:	214
& Kristnaska kanto:	175	& Mortinto:	216
& Printempa sorĉo:.....	176	& Kulureporko:	218
& Oh, rajdis, rajdis:	178	& Balado pri soldato:	220
& Por la tria eldono de "Legendoj":.....	179	& La nigra rajdanto:	221
& Poploj en aleo:	181	& La Reveno de l' Filo:	222
& Anima trankvileco:	183	& Enuo laborista:	223
& La juĝo de Momos:.....	185	& Ŝipisto kaj junulino:	225
& La tornistro:	187	& La avarulo:	227
		& La balado Espero:.....	228
		& La griloj:.....	230

& Duelo:

< Rekante 20 el 43 batoj por strofo, entute 301 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Nikolao Hohlov (La tajdo, 1928). Baladigis Martin Strid (2016) per rusa melodio modifita kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:43> (

a;Mi /MiMi MiMi doMi MiMi FaRe e;Re ReRe ReRe FaFa MiRe
Do;Mi FaFa FaFa MiMi ReTI ReDo o;La LaLa LaLa LaLa SiLa
Ti

(#Rekantaĵo: i;Mi dodo dodo do Ti rere doTi Ti La; La LaLa
Sodo mimi rere mifa mi; dolLa MiMi Tido La)

)×7)+

(& Strofoj:

'1 Nek vorton plu! Sed vire
prenu spadon – ; Kaj juĝu nin
hazarda, blinda sort'! ; Ne
vane mi ellernis la skermadon,
; Kaj volus mi nun ridi pri la
mort'!

(×: **Nin ligas kuna koro kaj
pasia amo ; Mi ne kapablas
ĝin forlasi pro perfid' ; Ni2n
ligas kuna kor'.**)

'2 La koron mi ne havas plu
virinan, ; En krustojn ĝi sin
kaŝis de l' kompat', ; Mi sentas
nur venĝemon kaj senfinan ;
Deziron: vin trapiki, malammat'!
.....

'3 Ne miru do kaj ne aspektu
stulta! ; Al batalpoz'! Eĉ
kontraŭ la edzin'! ; Ŝi rajtas ja
pro via krim' adulta ; Batali,
por en sango venĝi sin.

'4 Kaj kruce tuj premiĝis
fleksaj spadoj, ; Per fulma bril'
ekludis glata ŝtal', ; Kun ĉiu
mov' varmiĝis la spiradoj, ;
Por morta bat' sin klinis la
batal'.

'5 Venuso mem ne povus ŝin
superi ; En la graci', elekto de
la poz'. ; Kaj tra la hont'
komencis li fieri ; Pri tiu mikso
el tigro kaj mimoz'.

'6 Sed kiam ŝi rimarkis strion
ruĝan ; Sur lia kol' – ŝi spadon
ĵetis for, ; Kaj kun ekĝem' la
baton sangojuĝan ; Malbenis
tuj en la tremanta kor'.

'7 Ne pro la vund' malgrava.
Pikis larmoj, ; Pro kiuj ŝi
rekonis sin – virin', ; De mola
kor', ne taŭga por la armoj, ;
Kun stranga em': pardone kisi
lin.)

& En sun' tri knabinoj:

< Ripete 8 el 61 batoj por strofo, entute 305 paŝoj dum 4 minutoj. Norda Kantaro #2379. Verkis Gustaf Fröding. Komponis Felix Körling. El sveda tradukis Ernfrid Malmgren (1931). Takton baladigis Martin Strid.>

(#Melodio:

<:61> (

So /do SoSo La SoFi So o Mi i;So So LaSo Mi FaRe Do o; So do Tido Ti LaTi La a So o;La Ti LaSo La ReRe So;

(#Rekantaĵe: Mi DoDo DoRe Mi i;So DoDo MiSo do o;re mi redo So Mi;Do Re ReRe Re e;Fa ReRe ReMi Fa a;La ReRe FaLa re e;mi fa reTi So Ti;re do dodo do)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 En /sun' tri knabinoj iradis ; sur vojo al "Lindane Li" ; La jupoj svingiĝis, flirtadis ; kaj gaje kantetis la tri:

(×: **Tra lala lala la, ; tra lala lala la ; tra la lala la la, ; tra la lala la, ; Tra lala lala la, ; tra lala lala la ; tra la lala la la, ; tra la lala la.**)

'2 Kaj ili soldate marŝadis ; kaj poste valsadis la tri ; La senparulin' laciĝadis ; Do kantu kun ĝoj' tiel ci:

'3 Sed kreskis ĉe kurbo primolo ; kaj tie kun granda talent' ; kriadis la tri: Ho kukolo! ; kaj levis la jupon. Silent'!

'4 Farigis silento mortmorta ; ruĝiĝis jen ĉiuj la tri ; Sed kial silent' tiel forta ; kaj kial ruĝiĝ' tiel ĉi?

'5 Jes, ; Ĉar staris ĉe kurbo idolo ; studento, sed ne! estis tri! ; kriante imite: Kukolo! ; Kaj jen la gajega ari'!

& Dueto por violon' kaj aldo:

< Rekante 17 el 31 batoj por strofo, entute 310 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis David Samojlov (Naum Korĵavin, 1946?). El rusa tradukis Mikaelo Bronŝtejn. Baladige modifis melodion "Allegretto" de Mocart kaj aldonis novan rekantaĵon Martin Strid (2015).>

(#Melodio:

<:31> (/domi so faamire mi lredo; Tidolmi so; falmire mi lreTi doLa doLa; SiLalTi do; (#Rekantaĵe: mi Lafa re do reTi La; domi so faamire mi re;do Tidomi so faamire mi lreTi do))×10)+

(&Strofoj:

'1 /Mocart paŝis ebrie2ta ; al la2 hejm' ; e2n admi2ro malkvieta, ; fola2 plej.

(×: Paŝu kontenta en la ĉen' ; Fluas tonoj en aero ; Mantenu ni firme kaj fie3re.)

'2 Kaj la homojn gajokula ; ŝatis tre ; komponisto Mocart Wolfgang ; Amade'.

'3 Sonoretis foliaro ; de tili'. ; "Tili-tiki, tara-tara", – ; pensis li.

'4 Certe jes! Rutina bono – ; drinka vant'! ; Sed – duet' por violono ; kaj por ald'!

'5 Sian arton li disdonas ; sen repag'. ; Multajn sentojn li bezonas ; kun imag'!

'6 Komponisto Mocart Wolfgang, ; lerta vir' – ; donos, kiom homoj volas, ; laŭ dezir'.

.....

'7 Ve! Enhejme plej verŝajne – ; draŝ', incit', ; kaj tutcerte por, semajno – ; nigra frid'.

'8 Sen ridet', sen parolsono ; muta halt'. ; Sed – duet' por violono ; kaj por ald'!

'9 Jes! Do estu lia pago ; sen protest' ; por ĝuinda gaja blago ; en la fest',

'10 Por ebrio sen pardono, ; tutegal'! ; ja – duet' por violono ; kaj por ald'!

& Jen Rhodos:

< Rekante 22 el 31 batoj por strofo, entute 310 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo de feroa Harpa rimaĵo (Hørpu ríma).>

(#Melodio:

<:31> (

/LaLa La SiLa TiTi TiTi; TiLa SoFa MiMi; LaLa LaTi doTi
LaTi; do Ti La a; La SiLa TiTi TiTi; TiLa SoFa MiMi; Mi LaLa
LaLa LaTi; do Ti La a

)×10)+

(&Strofoj:

'1 Estis unu atleto. Oni

(×: - **vin invitas kuri** -.)

mokis lin pri lia pigro.

(×: **Sorĉistoj** ; **Estu ĉe l'**
junulino ; **vin invitas kuri** ;
ilin akceptu zorge ;
sorĉistoj!)

'2 Li foriris, kaj post migro ; li
revenis — fanfaroni.

'3 Li rakontis fierpoze
gloron ĉie li akiris.

'4 gloron ĉie li akiris. “Kaj
eĉ” — li orgojle diris —

'5 “foje en Rhodos mi saltis
..... alton, kiu tiel altis,

'6 ke l' venkantoj Olimpiaj
estus pri ĝi tre enviaj.

'7 La spektantoj min aplaŭdis,
..... kaj la tuta urbo laŭdis.

'8 Ho, se iu nun ĉeestus, al
vi tion li atestus.”

'9 Kriis tiam ĉeestanto:
“Ne necesas atestanto,

'10 (sed hero')× jen
Rhodos, nu, saltu do!”)

& La leono, la vulpo kaj la azeno:

< Minore rekante 22 el 31 batoj por strofo, entute 310 paŝoj dum 4 minutoj. Majore rekante 10 el 19 batoj por strofo, entute 190 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per varianto de melodio majora de Ora Koko kaj nova rekantaĵo. Alternativaj melodio minora kaj rekantaĵo estas tiuj de Harpa rimaĵo (Hørpu ríma), kiun li tradukis de feroa.>

(#Melodioj:

(

(#Minore: <:31> a;La /LaLa SiLa TiTi TiTi; TiLa SoFa MiMi; LaaaLaLa LaTi doTi LaTi; do Ti La a; La SiLa TiTi TiTi; TiLa SoFa MiMi; Mi LaLa LaLa LaTi; do Ti La)

?

(#Majore: <:19> re /dore mifa soso somi; reerere mimi mire remi; dore mifa so somi rere; mimi mire doTi La a)

)×10)+

(&Strofoj:

'1

(&Minore: Le/ono, vulpo kaj azeno,

(×:; - **vin invitas kuri** - . ;)

ĉasis en kuna entrepreno

(×:; **Sorĉistoj**, ; **Estu ĉe l' junulino**, ; **vin invitas kuri**, ; **ilin akceptu zorge**, ; **sorĉistoj!**))

?

(&Majore: Le/ono, vulpo kaj azeno ; ĉasis en kuna entrepreno.

(×: **Al azeno neniu bono ; venas de leono.**))

'2 Ĉasaĵon riĉan ili predis, ; kaj tiam la leon' dekretis,

'3 ke la azen' dividu juste. ; Ĉi tiu en tri partojn ĝuste

'4 egalajn ĉion do disdonis, ;
poste "Elektu!" — li proponis.

.....

'5 Kolere la leon' distranĉis ;
ĝin per la ungoj, kaj ĝin
manĝis.

'6 Nun metis la leon' ordonon,
; ke l' vulpo faru la disdonon.

.....

'7 Ĉi tiu lokis preskaŭ ĉion ;
en unu amason, nur porcion

.....

'8 tre magran lasis ĝi retene. ;
"Ho! — diris la leon' serene

—

'9 Jen la kalkulo senerara! ; De
kiu do vi, vulpo kara,

'10 lernis dividi tiel lerte?" ;
"El sorto de l' azeno, certe!"
.....)

& Lidja balado:

< Rekante 17 el 31 batoj por strofo, entute 310 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis kaj komponis Martin Strid.>

(#Melodio:

<:31> (/ (MiLa dodo LaLa SoTi; rere rere mido; (#Rekantaĵe: LaLa LaLa LaSo Mi;))×2

(#Rekantaĵe: TiSi TiTi rere mifa mi doLa MiSo La a)
)×10)+

(&Strofoj:

'1 Pri heroa brava homo ;
temas mia kanto.

(×:; **Fajro flamas en la forn'**
;)

Lidja Zamenhofa nomo ;
gloras esperanton.

(×:; **Preme pikas drata
dorn'. ; Ke la tagoj de l'
homaro estu pli lu2maj.)**

'2 Naskis ŝin patrino Klara ;
jen judino geta kies edzo
lingvon fara ; estis tute preta.
.....

'3 Ŝia patro pacon amis ; kaj li
lingvon kreis. Sed militoj
poste flamis ; fine ŝi pereis.
.....

'4 Por ŝi juna estis ĉio ;
esperanto-ligo. La bahaa
religio ; volas unuigon.

'5 Ŝi ĉe patra sia ĉerko ;
pensojn piajn plukis. De
Baha'-Ul-Lah' la verkojn ; bele
ŝi tradukis.

'6 Ŝi laboris por la paco ;
malgraŭ la defioj En
Eŭropo la minaco ; kreskis de
nazioj

'7 En Usono ŝi instruis ;
lingvon kaj la kredon.
Militemo monda bruis ; ĉase
sian predon.

'8 El Usono iri devis, ; hejmen
ŝi revenis. En Eŭropo paco
krevis, ; Hitler landojn prenis.
.....

'9 Malfacile tradukebla ; verko
Iridiono brulis for kun
hejmaj mebloj ; pro
naziordono.

•
'10 Ŝi pereis enTreblinka, ;
murdis la faŝistoj. Igas
penso jen konvinka ; min
esperantisto.)

& Sur unu kordo. (Defendo de l' rimo):

< Rekante 15 el 31 batoj por strofo, entute 310 paŝoj dum 4 minutoj. Poemon verkis Antoni Grabowski (1912). Baladigis Martin Strid per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:31> (

a;do /(domi somi remi faami;mi remi fare fami do;do)×

(#Rekantaĵe: LaLado miso somi remi; fami reremi fami domi;
TiTire dore doTi LaSo LaLa La)

)×10)+

(&Strofoj:

'1 Sur lir' dukorda, diris oni, ;
Ne eblas rima son', kaj jen ;
Pro tio devas takt-bastoni ;
Antikvajn ritmojn Lafonten'.

(×:; **Do paŝu fiere en la ĉeno**
; Manoj kune en firma teno ;
Aŭdi rakonton de la klara
voĉo jen.)

'2 Do mi demandas ridetante, ;
Ĉu ne aperos ankaŭ sen ;
Ornama rim' estrin' de Dante, ;
Vestite en ĥiton' aŭ ĥlen'.

'3 Dukorda liro? – Tial zumi ;
Kaj tinti adasiste mem; Mi
devas? Kordojn havas du mi, ;
Sed fingrojn kvin por kord-
ekprem'!

'4 Dukorda lir' ne igas fini ; La
kanton, se nur en lerneĵ' ; De l'
granda majstro Paganini ; Ni
studis diligente plej.

'5 Ŝiriĝis kord'!... Apollo punu
; Liriston, se ne scias li ;
Ludadi plu, sur lasta unu ;en
tri-kvin-sep-a pozici'!

'6 Senrima kanto estas por mi ;
Flor' sekigita sen odor', ;
Aŭtun-arbar' iĝanta dormi – ;
La muzikistoj flugis for.

'7 Jen fluis riveret' antaŭ mi, ;
Sed marĉon formas nun, kaj
jam ; Ne scias murmureti,
ŝaŭmi; Ĝin kovris iaŝima
skvam'.

'8 Kun rimoj dolĉa kant', sen
ili ; Parol' senmelodia, ĉar ;
Kiel ĝi povas fajfi, trili ; Kun
najtingal' en arbetar'?

'9 De l' rim' potencon konas
ĉiu, ; Ĝi muĝu, fulmu, tondru
tuj! ; Ekfrapu kor', okul' radiu:
; "Antaŭen filoj de l' patruj!"
.....

'10 Sur stel-standardo
Majstro-bardo, ; Skribante
himnon, rimis ĝin; Esper'
sonoru al homar' do ; Per rim'
en teropartoj kvin!)

& Anĉar':

< Rekante 17 el 35 batoj por strofo, entute 315 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Aleksandr Puŝkin (1828). El rusa tradukis (2000) Sergej Rublov. Baladigis (2015) Martin Strid per sveda marŝmelodio kaj nova rekantaĵo. Klarigoj (*): '1 Anĉaro, speco de morusaco, latine *Antiaris Toxicaria*.>

(#Melodio:

<:35> (

a;Mi /LaTiLaSi LaTi do oo;milre TiSo TiSo Tire La La;do
mifimire mifi so oo;tilla fire fire fila mi mii;dore mila laltilaso
lalso mi3;fi somi fire mi mi3;La re3fi laso fi mi;re diLa TiSo La
La

)×9)+

(&Strofoj:

'1 De/zerte, en senviva spac', ;
su2r arda kaj varmega tero ;
terure staras kun minac' ;
a2nĉaro*, arbo de sufero.

(×: **Nun aŭskultu je2nan
rako2nton ; dum danco
tondre bruas ; la ĉeno estas
ponto ; ni ĉiun paŝon ĝuas.**)

'2 Naturo de soifa step' ; ĝin
naskis en kolera horo, ;
veneno en fluanta streb' ;
plenigis arbon per doloro.

'3 Kaj gutas la venen' al ter' ;
dum ardas de tagmezo flamo, ;
ĝis la alveno de vesper' ; ĝi
solidiĝas je balzamo.

'4 Ne flugas bird' al tiu lok', ;
ne venas besto pro teruro, ;
nur nigra vento kun sufok' ;
impete blovas en obskuro.

'5 Kaj kiam nubo per torent' ;
akvumas arbon de la morto, ;
disfluas akvo en moment' ;
jam plena de venena forto.

'6 Sed sendis hom' al tiu lok' ;
alian homon por veneno. ;
Foriris li laŭ reĝa vok' ; ĝis la
alveno de mateno.

'7 Kaj venis li kun la venen', ;
prenita de la arbo morta, ; kun
frunto ŝvita, en ĉagren', ;
konfuzoplenta kaj senvorta.

'8 En tendo reĝa kun sindon' ;
li kuŝis pala kaj mizera, ; kaj
mortis sklavo apud tron' ; de
potenculo plej severa.

'9 Kaj dume sagojn por milit' ;
venenis reĝ' kun ruza celo, ; al
fremda tero sen hezit' ; li
sendis morton en kruelo.)

& Danco de skeletoj:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 319 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Eŭgeno Miĥalski (la 25an de novembro 1917. El: "Kantoj de l' Amo kaj Sopiro" (poemoj de la naiva junco)", Eldonejo N. Ŝapiro, Varsovio, 1934). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo Toreshavenaj de Jalgrima balado.>

(#Melodio:

<1,5:29> (

/so soosodo reerere soososo miisoso laasoso sooso;so miisoso laasoso soososo soososo milre mifa soso;

(#Rekantaĵe: sola so somi re do; re rere so somi so; soso somi re do o)

)×11)+

(& Strofoj:

'1 Skeletoj, skeletoj ĉirkaŭe.
Mi volas forkuri, ne povas. ;
Skeletoj dentklakas, grimacas
kaj en la danca2do sin movas.

(×: **Tondru danco tre ĉarme
; tretu fiere en ĉen' ; staras
jen mastrino.**)

'2 Jen ili jam estas proksime
kaj manojn ostecajn eltiras ;
Kaj volas min kapti en
brakojn, – mortecan
malvarmon elspiras.

'3 Skeletoj alpaŝas senĉese –
Skeletoj ridetas rikane. ; Mi
falas silente genuen, mi provas
forkuri, sed vane!

'4 Mi rampas, sed estas
malfrue. Min kaptas kaj
premas teruro, ; Skeletoj
dancante alpaŝas, aŭdiĝas
obtuza murmuro.

'5 "Ha, jen Vi! Vi volas Vin
savi de nia kares',
ĉirkaŭpreno?! ; Sed ni Vin
ekamis – deziras – kaj Ni ja al
ni apartenos.

'6 Ni montros al Vi novan
mondon – ni donos al Vi la
Potencon, ; Esencon de l'Scio
senfina – nur lasu la vivon
sensencan;

'7 Nin sekvu en mondon
posttomban – en mondon de
solaj spiritoj. ; Decidu, Vi
hom'! – Ni atendas. Kaj sekvu
nin tuj senhezite.

'8 "Ne, ne! Mi ne volas,
foriru! Deziras mi vivi
ankoraŭ. ; Mi amas la vivon
kun ĝia sufero kaj akra doloro.
.....

'9 Se estos mi eĉ malfeliĉa –
se premos min la efektivo. ;
Mi restos ĉi tie sur tero ; – ne
lasos mi kampon de l'Vivo.
.....

'10 Eĉ malgraŭ kruelaj ekbatoj
de la Realeco sensenta, ; Eĉ
malgraŭ solec' de l'animo kaj
malgraŭ de l'mensa turmento."
.....

'11 Skeletoj ekhaltis momente
en sia senĉesa almovo. ; Sed
tuje jam grincas, rikanas kaj
dancas, dancadas denove.)

& La ranoj volas reĝon:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 319 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Drako Longa, Norda Kantaro #4414 kaj disduigo de versoj (;).>

(#Melodio:

<:29> (

/mi mire redo doodo;do dodo dore mi; mi mire mire mimi; soso fami mi;

(#Rekantaĵe: redo re rere mire do rere re; rere mire doTi LaSo So LaTi do o)

)×11)+

(&Strofoj:

'1 /La tutan marĉon havis ; por si la rana gent'. ; Libere ili vivis, ; tamen sen kontent'.

(×: **Bruas danco en halo, dancu en ĉen'!** ; **Ĝojaj paŝas ni en esperanto-kunven'.**)

'2 Jupiteron ili tedis ; per petega preĝ' ; por la ricevo de ; moral-firmiga reĝ'.

'3 Jupitero, ride, ŝtipon ; ĵetis el la alt'. ; Kun ega plaŭdo ĝi falis. ; Hu! Per tima salt'

'4 rifuĝis nun de sia ; reĝo la popol' ; kaj longe kaŝis sin ; sub dika marĉtavol'.

'5 Elŝovis fine la kapon ; tamen unu ran', ; rigardis, vidis, poste ; al la kvaka klan'

....

'6 rakontis, ke la reĝo ; terura estas ŝtip'. ; Sen timo venis tuj ; vetnaĝe la tuta trib',

'7 sursaltis ili la ŝtipon ; aŭ surrampis ĝin, ; eĉ, malhonore per sia ; koto stampis ĝin.

'8 Kaj ili Jupiteron petis ; nun pri nova reĝ' ; anstataŭ la sentaŭga, ; ĉar senpova reĝ'.

....

'9 Nu, venis nova reĝo, ; sed
estis, ve, serpent', ; komencis
ilin ekstermi ; per venena
dent'.

'10 Nenie savo! Morta ;
silento kaj terur'! ; Sekrete ili
petis, ; pere de Merkur',

'11 Jupitron, helpi. Sed li ;
estis sen kompat': ; "Ne plaĉis
bona, plaĉu ; la malbona
stat'!")

& Kaj en Raduno:

< Ripete 32 sed rekante 16 el 64 batoj por strofo, entute 320 paŝoj dum 4 minutoj. El kaŝuba tradukis Stanislaw Sztolz.>

(#Melodio:

<:4> (

(/La mi do Lami /fa mi re e; /mi falre mi rere /do Ti La a;)×

(/so remi fa fa /so re mi i;)×

(#Rekantaĵe: × /La Tido re re '1 /fa re mi i; '2 /do Ti La a)

)×5)+

(&Strofoj:

&5. Kaj en Raduno:

'1 (/Ĵuĵu, ĵuĵu, fi/lineto, ; /Sur
u2rbplaco vi/an patron ;)×
/Oni murdis kun /aliojn ;
/Kun toporoj fe/rohavaj.

(×:; /**En Raduno sa/nga
akvo, ; /Malutilo pa/tron,
vivor!**)

'2 Patrin' ploras, vi vin dormu,
; Ho, ne al vi ploro, ho, ne!
Al vi Anĝel' aĵojn skulptas, ;
Boske flava birdo flugas.

'3 Ploras senfine patrino, ; Vi
dormigu sur liteto. Al vi
fiŝo en laĝeto, ; Al vi anser'
anserumas.

'4 Vin patrino ekvartiĝas, ;
Gardist-Anĝelo vin gardas.
Vin venigas sur herbejo. ;
Kronon donas en mateto.

'5 Kronon portas al vi hejme, ;
Vi ĝin metas sur patr-tombo.
..... Genuant' pro patro preĝas,
; Kiun murdis kruc-murdisto.
.....)

& Novaj kondiĉoj:

< Rekante 32 el 64 batoj por strofo, entute 320 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis kaj komponis Mikaelo Bronŝtein. Klarigoj (*): '1 SEJM = Sovetia Esperantista Junulara Movado. '3 Aktuale, revuo de SEJM.>

(#Melodio:

(/dodo dodo mi do; dodo TiLa Fa a; TiTi TiTi reTi Ti; SoSo LaTi do o;; dodo dodo mi do; dodo TiTa La a; fafa mire mi do; SoSo LaTi do o;

(#Rekantaĵe: (do o mido do doTi La La So; Ti i re Ti SoLa Ti re do)×2)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 Vivis ni trankvile ; En kutima SEJM* . ; Estis ĝi por ĉiuj ni ; Kvazaŭ kara hejm' . ;; Sed aperis kaŭzo ; Por ĉiesa mir' – ; Pri kondiĉoj novaj ; Venis onidir'.

(×: **2× Aĥ, kiaj ni estas feliĉaj, ; Ke venis novaj kondiĉoj...**)

'2 Estis konferencoj – ; Vere bona far'! ; Interŝanĝis sperton ni ; Ankaŭ en tendar' . ;; Oni rekomendas, ; Eble estas ver'... ; Interŝanĝi sperton ; Hejme per leter'

'3 Ni en "Aktuale"* – ; Bona informil'! – ; Legas artikolojn Ĉiam kun util' . ;; Oni rekomendas – ; Eble estas ver'... ; Ĝui la informojn ; Hejme per leter'

'4 Estis niaj kantoj ; La mistera mond' . ; Ĉe la fajro kantis ni ; En amika rond' . ;; Oni rekomendas, ; Eble estas ver'... ; La komunajn kantojn ; Kanti per leter'

'5 Eble mi ne pravas – ; Fia tumultul'! – ; La kondiĉoj novaj ; (Dume) estas en nebul' . ; Ĝoju kaj petolu, ; Nia kompani' – ; En kondiĉoj novaj ; (Eble) bone vivos ni.

(×: Aĥ, kiaj ni estas feliĉaj, ; Ke venis novaj kondiĉoj... ; Aĥ, kiaj ni estus feliĉaj, ; Se restus SEJMaj kondiĉoj...)

& Ho granda Dio:

< Rekante 33 el 65 batoj por strofo, entute 325 paŝoj dum 4 minutoj. Norda Kantaro #3102. Popolmelodio. Verkis Carl Boberg. El sveda tradukis William John Downes (1971).>

(#Melodio:

<:65> (

/(So SoSo Mi iSo SoSo LaLa Fa La a;La LaLa So oMi SoSo FaFa Mi i)×

(#Rekantaĵe: × h;So Sodo mi ire doTi doLa So o h;do '1 doTi Re e h;Fa LaSo Mi i '2 Tido re e;mi fa aTi do o o)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 /Ho granda Dio, kiam mi rigardas ; la mirindaĵojn kiujn kreas Vi, ; kaj ke senĉese Via amo ardas ; por teni ĉion en plenharmi'

(×: × ; **Animo mia gloras Vin per kant', (; ho granda /Di',)**×)

'2 Pri Vi parolas la somera vento, ; kaj floroj odorantaj en kampar', ; trilantaj birdoj en vespersilento ; sennombraj voĉoj de la kreitar'

'3 Miraklojn vidas mi en la Biblio, ; faritajn jam de tempo de Adam'; dum ĉiuj jaroj de mondhistorio ; ne ĉesis Via gracoplena am'

'4 Kaj kiam mi memoras pri la gloro ; de mia savo per la Krist-ofer', ; mi klinas min kun adorad-fervoro, ; dankante Vin kun pura kor-sincer'

'5 Kaj fine falos ĉiuj tempvualoj, ; kaj bonvenigos min Imanuel'; ravege sonos la anĝel-horaloj; ekĝuos mi la gloron de l' ĉiel' (×: (; **Des pli mi laŭde gloros Vin per kant', ; kaj dankos Vin, ; ho bona Di'.)**×)

& Marista lulkanto:

< Ripete 40 sed rekante 16 el 65 batoj por strofo, entute 325 paŝoj dum 4 minutoj. Norda Kantaro #5605. Malnova lulkanto kiun iomete poluris kaj popularigis Evert Taube. El sveda tradukis Magda Carlsson (1954).>

(#Melodio:

<:65> (

/La mi mi remi falmi redo Ti i;do rere rere re mire do o Ti ih; La mi mi remi falmi redo Ti i;do rere rere re mire do o Ti i;Ti dodo doLa Ti i;Ti dodo doLa Ti i;re re mifa mi redo Ti i La a;Ti dodo doLa Ti i;Ti dodo doLa Ti i;re re mifa mi redo Ti i La a h

)×6)+

(&Strofoj:

'1 (

(×: /Lul - la - lul', la kaldro²no sur brul' ;)

alvenas tri migrantoj sur/voje ;)×

(u/nua, ve, lamul' ; la dua, ho, blindul' ; la /tria ne povas pa/roli. ;)×

'2 (..... ĉiele migradas tri steloj ;)×

(unu blankas jen ; la dua ruĝas jes ; la tria estas luno, la flava. ;)×

'3 (..... blovadas tri ventoj surmare ;)×

(sur Granda Ocean' ; sur eta Skagerak' ; kaj longe for en golfo Botnia. ;)×

'4 (..... veladas tri ŝipoj suronde ;)×

(unua estas bark' ; la dua estas brig' ; la tria havas velojn ĉifonajn. ;)×

'5 (..... ŝipkest' havas tri figuretojn ;)×

(unua estas kred' ; la dua la esper' ; la tria estas amo, la tre ruĝa. ;)×)

& Ruĝa flago:

< Rekante 33 el 65 batoj por strofo, entute 325 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Carlo Tuzzi (1908). Lombarda popolmelodio. El itala tradukis Gianfranco Molle?>

(#Melodio:

<:4-5> (

o;So dore /mi mi ire dore /mi mi i;mi fami /mi re ere mire /re mi
o;So dore /mi mi ire dore /mi mi

(#Rekantaĵe: i;mi fami /mi re refa mire /do o o h; /mi mimi mido
remi /fa mi re e; /re rere reTi dore /mi re mi i; /mi mimi mido remi
/fa so la)

a;la /lala lala soso soso /ti ti 'DO

)×5)+

(&Strofoj:

'1 Popolo /ek al ribela /ago ;
Sub ruĝa /flago, sub ruĝa
/flago! ; Popolo /ek al ribela
/ago

(×:; **Sub ruĝa /flago marŝas
la e/sper'** ; /**Sub ruĝa flago
marŝas /la esper'** ; /**sub ruĝa
flago marŝas /la esper'**; /**sub
ruĝa flago marŝas /la esper'**
;) Kaj /vivu komunismo, vivu
/la liber'!

'2 De espluatatoj la avangardo
; Antaŭeniru sub ĉi-standardo
; Proleta aro venas via tago
Nur laboristoj manĝos kun
fier'

'3 En la fabrikoj, en la
kamparo ; En la minejoj kaj
sur la maro ; Pretigu vin al
ribela ago Por la
socialismo ĉie sur la ter'

'4 Ne plu fremduloj nek lima
baro ; Proletoj luktas por
solidaro ; Socialistoj ek al la
ago Per komunismo
venkas la socia ver'

'5 Kuraĝa roto, vi per indigno
; Ĉe sun' flirtigu ruĝan
insignon ; Vi, laboristoj, ek al
la ago Kaj vivu
komunismo, vivu la liber'!)

& La kampulo kaj la vulpo:

< Ripete 25 sed rekante 13 el 41 batoj por strofo, entute 328 paŝoj dum 4 minutoj. Norda Kantaro #125. El sveda tradukis Martin Strid (ĉ. 2008).>

(#Melodio:

< Polso > <1,9:41> (

mi /(so somi fala lalso somi doo;mi so somi refa faaalsolfa mi i;)×

do mimi reTi Tildoo LalFa So; do mimi reTi Tildoo LalFa So;Ti
relmi do o; h

)×8)+

(&Strofoj:

'1 /(Iris kampul' al ve2rda herbej' ; lin tie renkontis vu3lpo ;)× Ha, se mi havus ha2ŭton de vi ; subŝtofe sub la ĉa2po por mi ; kristna2ske.

'2 (Kaj ŝipon irantan donos mi al vi ; plej bonan laŭ via plaĉo ;)× Nur ke (': mi) havu (×: haŭton de)(,: vi)(×:; **subŝtofe sub la ĉapo por**)(,: mi)(×:; **kristnaske.**)

'3 (Sed ŝipon irantan ne deziras mi ; ĉar ĝin mi ne povas stiri ;)× Neniam (': vi) havos (×: haŭton de)(,: mi)(×:; subŝtofe sub la ĉapo por)(,: vi)(×:; kristnaske.)

'4 (Nutritan anseron donos mi al vi ; plej multan laŭ via plaĉo ;)× Nur ke mi havu

'5 (Nutrita ansero estas bona hav' ; sed aĉas la haŭton perdi ;)× Neniam vi havos

'6 (Kaj kuris ek la bela vulpfratin' ; al vulpo paroli volis: ;)× Ĉu ke li havu haŭton de vi ; subŝtofe sub la ĉapo por si ; kristnaske?

'7 (Vi ne al l' kampulo vendu ĝin ; ĉar li ne kapablos pagi ;)× Neniam li havu

'8 (× Pafarkon kampulo ŝargis per genu' ; '1 - aŭskultu, kiel ĝi vafis! ; '2 **kaj vulpon kaj inon pafis** ;) Vidu, mi havos

& Kobolda julkanto:

< Ripete 31 sed rekante 15 el 47 batoj por strofo, entute 329 paŝoj dum 4 minutoj. Norda Kantaro #2540. Verkis Alfred Smedberg. Komponis Vilhelm Sefve-Svensson Tradukis nekonato.>

(#Melodio:

<1,7:47> (

/do So do So doTi dore mi do; so o fa a mi i re e; re La re La redi remi fa re; la a so o fa a mi i;

(#Rekantaĵe: do So do So doTi dore mi do soh h soh h doh h h)

)×7)+

(&Strofoj:

'1 /Lumojn plu neniĥo homo havas, homo havas, ; jam en ombro tuta domo staras, domo staras. ; Tip tap tip tap tipe tipe tip tap, tip, tip, tap.

'2 Singardeme tiam (koboldaro)× ; sur piedfingroj venas (el sub planko.)×

(×: **Tip tap tip tap tipe tipe tip tap, tip, tip, tap.**)

'3 Je manĝaĵoj nun ne estas manko, nun ne manko, ; Tion vidis ili (de la flanko.)×

'4 Sur la tablon kuras (nun bubetoj.)× ; Trinki, manĝi taŭgas (por ĝuantoj.)×

'5 Dolĉaĵoj diversaj (multe estas.)× ; "Kiel gustas?" Ĝoje (ili flustras.)×

'6 Tutan nokton ili (ne nur manĝas,)× ; ĉe l' abio ili (ludas, dancas.)×

'7 Dum tagiĝo feston ili finas, feston finas, ; hejmkavernen grupo (nun rapidas.)×

& Kristnaska kanto:

< Ripete 20 sed rekante 13 el 37 batoj por strofo, entute 333 paŝoj dum 4 minutoj. Norda Kantaro #2580. Verkis N. F. S Grundtvig (1820). Komponis A. P. Berggreen (1849) aŭ L. M. Lindemann. Tradukis P. Th. Justesen (1954). Takton baladigis Martin Strid.>

(#Melodio:

<:37> (

MilFa /So MilFa So do dolTi LalSo Fa a; Mi lSo Mi lDo So o o;
SolTi La Laldo Ti Tilre dolmi relfa mi;

(#Rekantaĵe: So La fa mi; re do o Ti i do o o h)

)×9)+

(&Strofoj:

'1 Na²/skiĝi²s Li en
Be²tle²hem ; - Be²tle²hem ;
Ĝo²jega²s nun Je²ru²sa²lem ;
Haleluja! ; Haleluja!

'2 Knabin' malriĉa (': dum
malhel') (,:; - dum malhel' ;) ja
naskis princon de l' ĉiel'

(×,:; **Haleluja! Haleluja!**)

'3 En furaĝujo kuŝis Li
Jubilis birdokant' pri ĝi

'4 Oferis nokte reĝoj tri
trezorojn egajn tuj al Li

'5 Foriris nia mondmizer'
Saviĝis ĉiuj ni sur ter'

'6 Infan' fariĝis ni de Di'
Kristnasko pretas nun ĉe Li
.....

'7 Sur steltapiŝo blua plej
ni iros al ĉielpreĝej'

'8 Ni kantos tie laŭ instru'
pri Li, la infanet' Jesu'

'10 Al Li laŭdkantu ĉiuj vi
Savonton, fraton havas ni

& Printempa sorĉo:

< Rekante 23 el 37 batoj por strofo, entute 333 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Mondo kaj koro, 1921). Baladigis Martin Strid (2015) per sama melodio kaj rekantaĵo kiel por &Konfeso.>

(#Melodio:

<:37> (

a;do /dodo dore doTi La;So dodo dore mimi mimi; miifafa soso
somi mi;re dore doTi LaLa LaSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa
somi mire do; do mire do dodo Ti La)

)×9)+

(&Strofoj:

'1 Flir/tanta eta papili' ;
Flugadas super kampa vojo. ;
Ho, en lazur' flugpendu nur! ;
Mi nun forgesas pri l' malĝojo

(×:; **Zorgojn mi foje forgesas**
; Mi pri kredo ne promesas ;
kaj malgajon venkis mi ;
Tion mi ĝoje konfesas.)

'2 Kaj tuta la flugila polv' ;
Pentrinta mian infanmanon ;
Surpluvas min, kaj al la sin' ;
Ĝi portas post doloro sanon.

.....

'3 Kun kis' tumultas al la kor' ;
De l' infanaĝo mil memoroj, ;
Nenie pent', malĝoja sent', ;
Kruela aro de l' doloroj.

'4 Mi serĉas: kien estas for ;
Amdorn': malnova dolorilo...?
; Jen, en la kor' arĝentsonor': ;
Ĝojŝafidet' kun sonorilo.

'5 Ho ora sun', ho silkĉiel'! ;
Facila nub' el purarĝento! ;
Printemp' sen lim'! El la anim'
; Rifuĝas ĉia splena sento.

'6 La kamp', sonanta ondfein',
; Ornamis buklojn nun per
floroj ; Ŝi kantas jen, sin banas
en ; Rivero dolĉa de l' odoroj.

.....

'7 Ho, kia tril' de l' birda ar'! ;
Sur arboj dolĉa floro-ĉarmo! ;
Kun laŭta ĝem' ĉu do mi mem
; Min lavis per maldolĉa
larmo?

'8 Ho, vi mensogis al mi, kor',
; Ke estas tuta viv' sufera, ;
Ĝojkriu nun, eksciu nun ; Ke
estis via vort' malvera.

'9 Plezuro kia estas nun ;
Doloron per kalkano jugi! ;
Ho, kia ĝu': sub brila blu' ; Sur
kamp' ekkuri... suprenflugi...
.....)

& Oh, rajdis, rajdis:

< Ripete 32 el 48 batoj por strofo, entute 336 paŝoj dum 4 minutoj. Popolkanto. El litova tradukis Vytautas Šilas (1986?).>

(#Melodio:

<:4> (

/La LaTi do Ti /La Mi La a; /mi mifa mi re /do re mi i (; /mimi mifa mi re /mire doTi La Mi /LaLa Lado mi re /do Ti La a)×2

)×7)+

(&Strofoj:

'1 /Oh, rajdis, rajdis /longe mi.
; /Oh, rajdis, rajdis /longe mi. ;
/Al bien' veninte, /al bien'
veninte, /al bien' veninte
/haltis mi. ; /Al bien' veninte,
/al bien' veninte, /al bien'
veninte /haltis mi.

'2 (Ligis mi ĉevalon al baril'
;)×2 ((Ĉe verdanta ruta)×3
ĝardenet'. ;)×2

'3 Skuis sian kapon la ĉeval'
..... Ve, kaj aĉe tretis
verdajn rutojn ĝi.

'4 Ploras elirinta knabinet'
Pro la verdaj rutoj kiujn
tretis ĝi.

'5 Ĉit! Ne ploru triste,
knabinet' Ĉevaleton mian
..... donos mi al vi.

'6 Ne bezonas la ĉevalon mi
..... Tute ne bezonas la
ĉevalon mi.

'7 Ĉit! Knabin', ne ploru pro
ĉagren' Mi al vi donacos
..... ringon el la or'.)

& Por la tria eldono de "Legendoj":

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 341 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Mikaelo Bronŝtejn (2006). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado.>

(#Melodio:

<:31> (

/mi mi dore mi mimi mimido re fa;fa mimimi mimimi mimido re fa;

(#Rekantaĵe: mire do; do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; So3mi mimi re do)

)×11)+

(&Strofoj:

'1 Sendube, eĉ se kelknuance subtilaj, ; la novaj "Legendoj" ja ŝajnis utilaj

(×: **En la ĉen' ; Dancu nun trankvile ; Ĉiuj ni trankvilas ; Jen en amika ĉen' ; Dancu nun trankvile.**)

'2 almenaŭ al mi, la aŭtor' nemodesta, ; ĉar min impetigis la Into honesta.

'3 Post kiam cent homoj ĝin legis, kotopo, ; jam samopinias almenaŭ triopo,

'4 sendinta flataĵojn, sed ne sen kritikoj. ; Respondu mi nun: – Koran dankon, amikoj!

.....

'5 Ho ve! Senhezite forrajdas la tempo: ; Mi, kun la natura sincer' kaj sentem', po

'6 dek rubloj vendata en falso ekrana, ; ja ŝajnas person' absolute lontana

'7 de l' nuna epoko, de l' juna medio, ; malmoda. Sed plu konvinkita pri tio,

'8 ke nin la juneco ne vane ekzaltis, ; ke l' baroj obstinaj ja iom dissaltis

'9 per nia fervoro kaj nia
espero. ; Nu, eble, nevene nin
tenis la Tero,

'10 kaj la juna gent', krom la
lingva belego, ; ricevas ĉi
libron por hasta tralego –

'11 sen duraj ordonoj, kun nur
rekomendoj ; alude humilaj –
ja estas legendoj... ..)

& Poploj en aleo:

< Rekante 9 el 19 batoj por strofo, entute 342 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Mondo kaj koro, 1921). Baladigis Martin Strid (2015) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:19> (

/do do remi fafa rere; Ti TiTi dore mimi dodo;

(#Rekantaĵe: do dodo remi fafa rere; Ti dore mi do)

)×18)+

(&Strofoj:

'1 ... /Poploj staras en aleo... ;
Ekiras vent' kun laŭta veo.

(×:; **Dance aŭskultu la
rakonton ; Paŝu renkonte.**)

'2 Ŝirita, trema ĝemospiro. ;
Jen: venta kanto pri l' sopiro.

.....

'3 Kaj dum la vento vee
blovas, ; La poploj treme sin
ekmovas.

'4 l' unua klini sin komencas, ;
Ĝi al la dua riverencas,

'5 Sed ĝi al tiu vane zumas, ;
La trian tiu amindumas.

'6 La tria flustras al la kvara ;
Kun ama tremo foliara,

'7 Kaj tiel plu ... jen lud'
sencela ; Kaj malfeliĉa kaj
kruela

'8 Kaj en la tuta vic' la sama: ;
Rifuz' de am', petego ama...

.....

'9 Sovaĝe hurlas jam la vento:
; Sopir', sopir', sopir',
turmento... ..

'10 Sovaĝe ĝemas arb' vipata ;
De la sopiro senkompata...

.....

'11 Reklini sin ... kaj miksus
drone ; Sin branĉ' kun branĉ'
kaj estus bone,

'12 Sed la proksim', la certa
havo ; Senloga estas kaj sen
ravo,

'13 Sopiro je l' neatingebla: ;
Jen flam' de l' kor'
neestingebla... ..

'14 Ho, steloj en la frosta alto!
; Facila nub' enflug' senhalto!
.....

'15 Flor' sur la pint' de l' roko
kruta! ; Sur frosta lip' rifuzo
muta!

'16 Ho, flor' ravanta de l'
deziro, ; Ho, flor'—velkonta
post deŝiro!

'17 Ĉu veas, plendas nun la
vento ; Sub vip' sovaĝa de l'
turmento,

'18 Aŭ, dum ni en doloro
dronas, ; Ĉu rid' infera ĝia
sonas?

& Anima trankvileco:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 348 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per sudinsulaj melodio kaj rekantaĵo de Jalgrima balado.>

(#Melodio:

<1,6:29> (

/La Tiidodo Ti LaMi La Tido TiLa; dolre miimimi fa mimi reldo mimi miLa;

(#Rekantaĵe: dore mi redo La Fa;So La dore mimi fami mimimii; redodoo do Ti La a)

)×9)+

(&Strofoj:

'1 /Ŝuista lernanto dumnokte frapetas ; A2l pordo de l' majstro-edzi2no kaj petas:

(×: **Tondru danco tre ĉarme ; Nun tretu fiere ĉiuj en la ĉen' ; Staras jen mastrino.**)

'2 "Majstrino, bonvolu la ĝenon pardoni! ; Ĉu volas glaseton da akvo vi doni?"

'3 La bubo ja loĝas ĉe sia sinjor', ; Ne iras vespere por dormi li for,

'4 Kaj jen la estrino la akvon konsentas. ; La bubo sed novan deziron prezentas:

'5 "Majstrino, bonvole pardonu! Pardonu! ; Mi petas, anstataŭ glaseton vi donu

'6 Ja poton plenplenan de akvo al mi!" ; Kaj ankaŭ ĉi tion konsentas do ŝi.

'7 "Mi petas, mi petas, sitelon vi prenu, ; Bonvole duone plenigi ĝin penu!"

'8 "Nu bone! Mi ankaŭ sitelon ja prenas, ; Se tio pli bone al vi nun konvenas." -

'9 "Ho tre estimata vi majstro-edzin', ; Bonvolu plenigi tutege nun ĝin!"

'10 "Ho bubo! Ĉu havas vi akvo-manion? ; Cetere konsentas mi ankaŭ ĉi tion:

.....

'11 Sitelon plenplenan de akvo mi donas, ; Sed diru, por kio vi akvon bezonas?"

'12 Kaj diras la bubo post
longa hezit': ; "En mia

ĉambreto ja brulas la lit'!")

& La juĝo de Momos:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 348 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por La plej granda kulpulo.>

(#Melodio:

<:29> (

/La dore mi mi mire fare mi do; do redo dodo doLa dodo doTi;

(#Rekantaĵe: La dore mi mi re falre mi; doTi reTi do Lado Ti Ti La a)

)×12)+

(&Strofoj:

'1 /En la pratempoj, pri la mondo-kreo ; laboris Zeŭs, Athena, Prometheo.

(×:; **Venu mastrino en la2 ĉen' ; Prenu mian manon en firma ten'.**)

'2 (Kaj kiam Zeŭs pri l' taŭro tute pretis,)×

'3 kaj Promotheo pri la homo, ; Athena pri la domo,

'4 ili de Momos petis ; prijuĝi, kion ili metis.

'5 Ĉi tiu, tre envia, ; parolis jene pri labor' ilia:

'6 "Ba, Zeŭs la taŭron fuŝis, ne metinte ; okulon al ĝi kornopinte.

'7 Tiaĵon eĉ ne indas ja kritiki: ; Ĝi nun ne vidas, kien piki.

'8 Kaj Prometheo fuŝis tre mizere ; la homon, ĉar li ne ekstere

'9 lokis la koron: Oni nun ne vidas, ; ĉu bon' aŭ miso en ĝi sidas.

'10 Athena fuŝis pri la dom' sendube, ; ĉar ŝi ne muntis radojn sube,

'11 ke, se l' najbar' tro tedas
jam ĉikane, ; ĝin oni nur
pluŝovu mane."

'12 Zeŭs, tre indigna pro l'
envia juĝo, ; lin puŝis de
Olimp' kun tondromuĝo.)

& La tornistro:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 348 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo de La oreloj de la leporo.>

(#Melodio:

<:29> (

/La dore mi mi mire fare mi do; do redo dodo doLa dodo doTi;

(#Rekantaĵe: La dore mi mi re falre mi; doTi reTi do Lado Ti Ti La a)

)×12)+

(&Strofoj:

'1 Survoje pasis migra metiisto
; kaj gaje fajfis: Lia
dorstornistro

(×:; **Venu mastrino en la2
ĉen'** ; **Prenu mian manon en
firma ten'**.)

'2 de pano, lardo kaj viando
plenis. ; Sed, ho terur', subite
lupo venis.

'3 Li rampis, por sin savi de
atako, ; sur arbon, tere restis
lia sako,

'4 kaj li aŭskultis, kiel en la
subo ; festenas ŝmace el la
sak' la lupo.

'5 Foriris tiu fine, kaj li povis ;
subrampi do, sed, kion li
retrovis,

'6 pro tio la ĉielon ne tre
dankis. ; La tuta lardo kaj
viando mankis.

'7 Eh! Li pluri volis kun la
resto, ; sed io bruas. Ĉu la
rabobesto

'8 revenis? Li rerampis en
teruro, ; kaj, ĉar dumtempe
venis la obskuro,

'9 ne riskis plu subrampi
ĝismatene. ; Tiam descendis,
laca, kaj — ĉagrene

'10 li vidis, de malsato
salivglute, ; ke l' kampaj
musoj manĝis ĉion tute.

'11 Nur paneretoj restis el la
pano, ; kun tiuj kuris formik-
karavano.

'12 Nun li ekkriis: “Ho, la
mondo belas! ; Fortulo rabas,
malfortulo ŝtelas!”

& Vokto kaj servistino:

< Rekante 13 el 29 batoj por strofo, entute 348 paŝoj dum 4 minutoj. Norda Kantaro #4448. El sveda tradukis Martin Strid (2015 FLOrE).>

(#Melodio:

<:29> (

o;so /(so3la sofa mi mifa so3la sofa mi do;)×

(&Rekantaĵe: re3mi fa faasofa mire doodore mi miifami re reeremi fareTi do3do do)

)×12)+

(&Strofoj:

'1 Kaj /vokto konsilion rajdis dunge servistinon ; kiu famis esti kaj lerta kaj rapida

(×:.; **Hura hej, kato razita, tero, arbar', bona en far' ; jen kaĉosupo kun dolĉa gust'.**)

'2 Kaj selis li iranton sian, ĉevalinon buntan ; kaj rajdis li antaŭen sur vojo por li kurba.....

'3 Li rajdis ĝis li haltis sur la placo en la urbo ; renkontis servistinon bonan, ŝi vendis panon el korbo.....

'4 Aŭskultu servistino mia, ĉu vi ĉe mi laboros? ; Ricevos vi plej altan pagon, kiun iu volus.....

'5 Falĉilon novan petas mi kun ruĝaj dek orringoj ; kaj iros kun vi agron dum servistoj iras svingon.....

'6 Kaj bulkon panan petas mi por ĉiu baka pluko ; kaj sur tiu buteran uncon sur ĉiu kuko.....

'7 Kaj ruĝan jupon petas mi kun ruĝaj dek orŝnuroj ; La ŝtofo estu el Amsterdam', kudristo el Sud-Mojro.....

'8 Nutritan porkon ĉiuvendrede dum la fasto kaŝan ; kaj en sabatoj sekalan buŝelon se vi draŝas.....

'9 Kaj bovon petas mi, kaj la koloro estu bunta ; Unu korno estu rekta, l' alia estu kurba.....

'10 Kusenon bluan petas mi
kun tute gruaj plumoj ; kaj
felon volas mi surhavi el sep
blankaj vulpoj.....

'11 Kaj ĉambbron grandan
petas mi kun dek du litoj
pretaj ; Mi tie noktripozos kun
viaj servistoj lertaj.....

'12 La vokto rajdis hejmen re,
krucumis en ĉiu strato ;
Morton donus mi al tia, kaj
pagon kaj manĝsaton.....)

& Inter ĉiuj plej feliĉa ul':

< Rekante 32 el 70 batoj por strofo, entute 350 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Vladimir Türk. Por baladigi plioftigis la rekantaĵon Martin Strid (2015) kaj forigis taktmezuron silentan.>

(#Melodio:

<:2> (

(/LADo TILA)×3 /Mi h; (/ReFa MiRe)×3 /La h; (/MiSi FaMi)×3 /Si h; (/Lado TiLa)×2 /SiMi FiSi /Lah; La; /SiSi SiSi /SiMi FiSi /La h

(#Rekantaĵe: /h LA /Re e /hMi FaMi /La Mi /Do lLA; /TITI TITI /TITI DoTI /LA lTI /lDo; Mi /Re e /hMi FaRe /La Mi /Do lLA; /TITI TITI /TITI DoTI /LA A)

)×5)+

(& Strofoj:

'1 Kapon klinu, kamarad',
tunelo antaŭ ni ; sonas reloj,
sonoriloj, krias la fajfil', ;
maŝinestro en la budo estas ja
bravul' ; mi eĉ malgraŭ fulgoj
estas plej feliĉa ul', ; jes, ;
inter ĉiuj plej feliĉa ul'

(×: **Mi mem bonege konas
ĝin, ; trake mi ne solas dum
la viv', ; mi mem bonege
konas ĝin, ; trake mi ne
solas dum la viv'.)**)

'2 Se mi vidas nigran fumon
flugi de l' maŝin' ; en la vasta
mondo certas unusola sci', ; en
la vasta mond' mi firme tenas
en memor': ; sur la reloj (: la
vagant' ne vivas en izol',) (×:;
jes, ;) (: la vagant' ne vivas en
izol')

'3 Frisko post la dorso, verdas
nia signalil' ; trajno flugas
nokten kiel taŭro en panik' ;
ĝoju, civitanoj, vin atingas nia
voj' ; sur la reloj la vagant' ne
vivas en izol'

'4 Karbo sub la dorso, la
kovrilotruoj mil ; lampon
anstataŭas super kapo stala
bril' ; en vagonon mi enrampis
krabe kun plezur' ; mi eĉ
malgraŭ fulgoj estas plej feliĉa
ul'

'5 Mi ŝin vidis en fosaĵo stari
ĉe la trak' ; min allogis la
ridemo kaj svinganta brak' ;
salutite, ŝi heziton ludas per
okul' ; mi eĉ malgraŭ fulgoj
estas plej feliĉa ul')

& Protestaj voĉoj:

< Rekante 17 el 35 batoj por strofo, entute 350 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Marjorio Bultono (Marjorie Boulton) (Sennaciulo, januaro 1962; Sub la signo de socia muzo, 1987). Baladigis Martin Strid (2016) per angla popolmelodio.>

(#Melodio:

<:35> (

aa;LaTi /do3do TiLa Tido reedo;re mimi LaLa SoLa Mi La;Ti do3do TiLa Tido reedolre; miiLaLa doTiLaSo La La

(#Rekantaĵo: a;Ti do3do TiLa Tido re; mi3mi LaLa SoLa MiiLaTi; do3do TiLa Tido re; miLa doTiLaSo La La)

)×10)+

(& Strofoj:

'1 Ni2 /nun anoncas kun fiero,
; ke grandan bombon ni ĵus
provis ; sukcese en la
atmosfero2 ; ; rokebenajon ni
disblovis.

(×: **Kviete paŝu en la ĉen'** ;
kune finon ni alveno2s ;
Falas alte de fraksen' ;
semoj dise sur la teron.)

'2 Ni montris nevenkeblan
forton. ; Skuiĝis nia tuta ter'!"
; "Disblovis vi malsanon,
morton! ; Falas sterilo kaj
kancer'!"

'3 "Ni estas nun pli
altprestigaj." ; "Aktiva jod'
cent tridek-unu! ; Infanaj
glandoj malfeliĉaj!" ; "Ni
estas grandaj." "Dio punu!"

.....

'4 "Nun plialtiĝas la impostoj."
; "La malamik' nin timos pli."
; "Stroncio naŭdek en la ostoj
..." ; "Kie sur ter' nin ŝirmu
ni?"

'5 "Blindajn infanojn vi
lotumas." ; "Neniu povos nin
kontraŭi." ; "Jam leŭkemio
min konsumas." ; "Ĉu morgaŭ
povos nun morgaŭi?"

'6 "Ankaŭ cezi' cent tridek sep. ; "Kian infanon nun mi naskos?" ; "Kio okazos al la nep' ; Se kromosomoj mem fiaskos?"

'7 "Ni fortan pozicion ĝuas." ; "Ni sentas naŭzon, grandan lacon." ; "La homajn genojn mem vi skuas." ; "Per bomboj ni certigas pacon!"

'8 "Ni pezos en la konferenco." ; "La lakto estos venenita." ; "Plej glora estas la potenco." ; "Ve al kruelo hipokrita!"

'9 "Kancero, blanka sango, mortoj ; aĉegaj, venenad' aera, ; kaj idiotoj kaj abortoj, ; kaj misformiĝo enutera,

'10 en mond' de malbenitaj amoj – ; krioj de geamantoj altu – ; monstroj, cikatroj, ĝiboj, skvamoj, ; sepso, nekrozo : haltu, haltu!"

& La ovoĵ:

< Rekante 19 el 27 batoj por strofo, entute 351 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo e Filino de Torkil.>

(#Melodio:

<1,7:27> (oso /sodo dodo rere sooso;so soomi;mi soso soso fami remi; fa mimi re do; rere rere rerere soso somi; sososo soso faamimi remi; fa mimi re do)×13)+

(&Strofoj:

'1 Ko/kino ĉiutage ovis.

(×: – **ja danci** –)

Mastrino, ne kontenta, provis

(×: – **Bone min ŝancis***, ; **jen mi volas plankon antaŭen danci**, ; **kvankam vi mian vivon minacis**, ; **bone min ŝancis.**)

'2 du ovojn havi tage — riĉe
..... do ĝin nutradis. Trograsiĝe
.....

'3 (plu ovi ĝi ne povis. ;)×

'4 Jen similaĵ' al ĉi afero:
Vegetis homo en mizero,

'5 al Hermes preĝis li fervore,
..... kaj longe, jam en
malespero,

'6 ĝis fine Hermes lin favore
..... aŭskultis: Dotis per
ansero,

'7 kiu miraklan havis povon:
..... Tagtage meti oran ovon.
.....

'8 La homo do pli kaj pli riĉis,
..... sed tamen li ne
kontentiĝis:

'9 L' ansero ovis ja konstante,
..... sed tiuj ovoĵ venis lante.
.....

'10 “Mi buĉos ĝin — li pensis
nun do, — l' interno devas
esti oro,

'11 ĉi granda birdo per trezoro
..... provizos min tuj en
abundo.”

'12 Li buĉis ĝin, sed, je
konsterno, l' ansero havis
en interno

'13 sole viscerojn, karnon,
merdon. La hom' priploris
sian perdon.)

& Kion ni faru al ebruiulo:

< Ripete 28 sed rekante 20 el 32 batoj por strofo, entute 352 paŝoj dum 4 minutoj. Marista laborkanto. El angla tradukis nekonato strofojn '1-4 kaj Martin Strid (2015) '5-11. Klarigoj (*): '1 Ŝi, la ŝipo. '11 Rudraŭ = rudre je ; Exxon (elparolu: "Ekson"), nafta kompanio ExxonMobil, fifama pro akcidento katastrofa de cisternŝipo Exxon Valdez en jaro 1989.>

(#Melodio:

<:2> (

/miimimi miimimi /miLa domi; /reerere reerere /reSo Tire;
/miimimi miimimi /mifa sola; /somi reTi /La La;

(#Rekantaĵe: /mi mi3mi /miLa domi; /re re3re /reSo Tire; /mi
mi3mi /mifa sola; /somi reTi /La La;)

)×11)+

(&Strofoj:

'1 (/Kion ni faru al /ebruiulo?
;)×3

(×: /Frue en ma/teno. ;
(/Hura ŝi* /nun leviĝas ;)×3
/Frue en ma/teno.)

'2 Metu ŝalupen ĝis resobriĝo
.....

'3 Truon malŝtopu, lin
malsekigu

'4 Tiru lin alten per forta ŝnuro
.....

'5 Ligu lin poŭpen kiam
jardon subas

'6 Levu lin gambe per kura
seĝnodo

'7 Donu al li dozon da salo kaj
akvo

'8 Donu guston de submastra
ŝnuro

'9 Razu la mentonon per rusta
razilo

'10 Lin enlitigu kun ŝipestra
filino

'11 Metu lin rudraŭ*
cisternŝipo Exxon*

& Kudristo kaj bopatrino:

< Ripete 18 sed rekante 4 el 32 batoj por strofo, entute 352 paŝoj dum 4 minutoj. Popolkanto. Norda Kantaro #4821. El sveda tradukis Martin Strid (2016).>

(#Melodio:

<:32> (o;So /SoLa FaSo MiDo MiSo doLa FaLa So3;So SoLa FaSo MiDo MiSo doLa FaLa So3;So SoSo LaTi do Mi;So SoFa ReTI DoMi So3;So SoSo LaaTiTi doMi So;So SoFa ReTI Do)×11)+

(&Strofoj:

'1 Ku/dristo estis iam, kaj multnombras tiuj ĉi. ; Kudristo estis iam, kaj multnombras tiuj ĉi. ; Li lertis per kudrilo ; kaj grasis kiel ĝi, ĝi, ĝi, ; **Hej kantu hop! Fade rala lej**, ; kaj grasis kiel ĝi.

'2 (Li kudris vestojn gra2ndajn kaj etajn eĉ por flor' ;)×

kaj ili kolorigis

('.; sed puris lia (kor',)×3)

(×.; **Hej kantu hop! Fade rala lej**, ;)

(.; sed puris lia kor'.)

'3 Li amis junuli2non, rozruĝa blanka sin' kaj tion bone povis, ; ĉar mortis la edzin', - dzin, -dzin

'4 Kaj bopatrinon havis li, sufiĉas jena dir' Egalon en ĉi mondo ; ne vidos iu vir', vir', vir'

'5 Kaj malsaniĝis ku2dristo, kuŝis en la lit' Bopanjo mendis ĉerkon ; pre morto sen hezit', -zit', -zit'

'6a Kudriston ŝi vua2lis en krepa gazovest' kaj kiam tion faris, ; invitis ŝi al fest', fest', fest'

'6b Kudriston ŝi vua2lis en gaza krepfaden' kaj kiam tion faris, ; invitis al festen', -sten', -sten'

'7 Ofertis noktomeze ŝi per kafo kaj desert' sed la kudristo flaris, ; ekstaris el la ĉerk', ĉerk', ĉerk'

'8 Enpaŝis en salo2non, jen
krepa gaza vid' "Ho, donu
al mi kafon, ; suferas mi pro
frid', frid', frid'

'9 Bopango perdis kru2ĉon,
ĉetable sida bat' forfalis de
la seĝo ; kaj mortis kiel kat',
kat', kat'

'10 Bopanjon de la planko
lev[is ku]dristo kun hastem'
..... kaj metis en la ĉerkon, ; ŝi
tiun mendis mem, mem, mem
.....)

& Vento kaj suno:

< Per melodio #F rekante 37 el 61 batoj por strofo, entute 366 paŝoj dum 5 minutoj. Per melodio #S rekante 32 el 53 batoj por strofo, entute 318 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per novaj rekantaĵo kaj melodio inspirita de sveda polso "Forslundspolskan" (#F) kaj aldonis poste alternativan melodion pli simplan (#S).>

(#Melodioj:

((#F: <:61> /Mi DoMi SoTi reTi dolmi mi; reremi reTi SoTi reTi dolmi mi; Mi DoMi SoTi reTi dolmi mi³;mi remi reTi SoTi reTi dolmi mi;

(#Rekantaĵe: Mi do mire doTi LaLaSoLaTi do TiSo La La FaMilRe Mi Mi i ; Mi DoMi So³So SoFa DoFa La³;La dore doTi SoTi reTi domi ; Mi do mire doTi LaLaSoLaTi do TiSo La La FaMilRe Mi Mi i))

?

(#S: <:53> /So LaLa TiTi dodo TiLa; SooSoSo LaLa TiTi TiLa So So³;So LaLa TiTi dodo TiiLa;La SoSo LaLa TiTi TiLa So So;

(#Rekantaĵe: Ti doododo dodo TiLa SoLa Ti TiTi dodo TiTi do do; SooSoSo So³So LaLa SoFa Mi³;Mi FaFa FaFa SoSo LaTi do do³;Ti doododo dodo TiLa SoLa Ti TiTi dodo TiTi do do)))×6)+

(&Strofoj:

'1 /La vento kaj la suno vetis, ;
kiu el ili estas la pli forta, ; kaj
kiel provon, ili me²tis ;
depreni de migrulo
mantelporta

(×; **Nun kantu fiere per via
plej forta voĉo kun sincero ;
Unu per varm', alia per
malĉarm' ; Varias la vetero
sur la tero ; Nun kantu fiere
per via plej forta voĉo kun
sincero.**)

'2 la vestojn. Nu, la vento
provis ; l' unua: Ĝi kolektis
sian spiron, ; ekstreĉis sian
pulmon, blovis, ; blovegis laŭ
la tuta pov' la viron,

'3 sed ju pli furioze ĝi diboĉis,
; la vestojn tiu des pli firme
kroĉis, ; eĉ plejdon ligis ŝultre.
; La vento nun rezignis,
senrezulte.

'4 La suno sekvis. Ĝi trankvile
; eklumis, disverŝante varman
helon, ; jam lumis tiel
varmobrile, ; ke la migrulo
plejdon kaj mantelon

'5 demetis. Tiam ĝi ekardis. ;
La homo disbutonis sian
jakon, ; sed ankaŭ nun tro
varme fartis, ; abunde ŝvitis,
sentis veran bakon,

'6 plu ne eltenis; jakon,
pantalonon ; deĵetis, eĉ
ĉemizon kaj kalsonon, ; kaj
plonĝis, tute nuda, ; por bani
sin, al la river' apuda.)

& Vojaĝo al Oriento:

< Ripete 31 el 61 batoj por strofo, entute 366 paŝoj dum 5 minutoj. Norda Kantaro #3380. Popolkanto. El sveda tradukis G-r Lövvenmark (1908).>

(#Melodio:

(
(Mi /La aTi do TiiLa Ti i Mi; Mi mi reere do dooLa Ti i;)×
(Ti do dodo re rere mi ilre do; dolTi La Laado Ti MiiSi La a;)×
h)×6)+

(&Strofoj:

'1 (Mi /Orienton ekiros ; al la kortrezoro de mi ;)×

(trans montoj kaj valoj profu2ndaj ; li2 loĝas sub verda tili' ;)×

'2 (Jen antaŭ l' domet' de l' amata ; du arboj de verda kolor ;)×

(floradas, ĉiame plenegaj ; je floroj kun dolĉa odor' ;)×

'3 (Somere kaj vintre verdadas ; ja ili en la arbaret' ;)×

(La unu muskatojn ornamas ; la duan ar' da diantet' ;)×

'4 (Ĝarden' ankaŭ estas plantita ; apude, laŭ granda talent' ;)×

(kun multaj kreskaĵoj kaj arboj ; superaj al ĉies prudent' ;)×

'5 (Sed tute mi ne la riveron ; forgesu, el pura kristal' ;)×

(la fluojn da akvoj vivigaj ; akvantajn la arbojn de l' val' ;)×

'6 (Animo, vi vin ekpretigu ; iradi la vojon de l' pen' ;)×

(Trans montojn kaj stepojn senakvajn ; antaŭe de l' nokta alven' ;)×)

& La glorkanto al UEA:

< Ripete 14 sed rekante 4 el 23 batoj por strofo, entute 368 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Jean Thierry (kabaredo La Tri Koboldoj, kun Raymond Schwarz, 1944-1956) laŭ melodio de franca kanto "Dans une tour de Londres", kiun primtaktigis Martin Strid (2016).>

(#Melodio:

<:23> (/Mi LaTi doTi La MiMi Fi La Mi i; Mi LaTi doTi La Mi;mi mire dore mi i;do dore do Ti La a)×16)+

(&Strofoj:

'1 /Mi konis delegiton **de UEA** ; Mi konis delegiton ; fervoran pli ol mi ; fervoran pli ol mi.

'2 (: Li portis la jarlibron)
(×: **de UEA**)

(,: Li portis la jarlibron)
(; en sia poŝ' kun si)×

'3 Okaze de kongreso utilis ĝi al li

'4 Ĉar dum la festomanĝo li manĝis pli ol tri

'5 Kaj kun la prezidanto je sano trinkis li

'6 Nun sekvis la kunsido de l' granda asoci'

'7 Konforme al statutoj raportis ĉiu pri

'8 La multenombraj servoj sur la teritori'

'9 Sed nian delegiton ekkaptis emoci'

'10 Ĉar pri la utileco Nenion sciis li

'11 Li diris: Karaj membroj Mi venis tien ĉi

'12 En tiu ĉi momento forkuri devis li

'13 Rezultis el agapoj kolik' kaj kompani'

'14 O! ve! En la 'cesejo ne estis flugfoli'

'15 Kaj tiam la jarlibro utilis tre al li

'16 Ni kantu do la gloron de l' granda asoci'

& 1905:

< Rekante 20 el 43 batoj por strofo, entute 369 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Nikolao Hohlov (La tajdo, 1928). Baladigis Martin Strid (2016) per rusa melodio modifita kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:43> (

/MiMi MiiMiMi do MiMi FaRe e; ReRe ReeReRe Fa MiRe
DoDo; FaFa FaaFaFa Mi ReTI ReDo o; LaLa LaaLaLa La SiLa
TiTi

(#Rekantaĵo: i;Mi dodo dodo do Ti rere doTi Ti La; La LaLa
Sodo mimi rere mifa mi; dolLa MiMi Tido La a)

)×9)+

(& Strofoj:

'1 /Mi memoras: fenestroj
flamantaj ; Sub la suno subira
sangadis, ; Kaj la stratoj,
ebriaj pro kantoj, ; Al la ruĝa
liber' serenadis.

(×: **Nin ligas kuna koro kaj
pasia amo ; Mi ne kapablas
ĝin forlasi pro perfid' ; Ni2n
ligas kuna kor'.**)

'2 Iu forta la brakojn
muskolajn ; Disetendis por
fojo unua ; Kaj elĵetis
malnovajn idolojn ; El la
templo per bato forskua.

'3 Flirtis gaje skarlataj
rubandoj, ; Oron semis la suno
vespera, ; Kaj respondis al
ĉies demandoj ; Juna voĉo:
libero, libero!

'4 Sed ekkrakis la pafoj – de
kie? – ; Ekbruegis eksplodoj
tertremaj, ; Kaj kun fajfoj de l'
kugloj, orgie, ; Ĉien flugis
malbenoj kaj ĝemoj.

'5 Freneziĝe, la homoj sin ĵetis
; Post la niĉojn, al strataj
anguloj, ; Puŝis en la tumulto,
faletis, ; Kun teruro en larĝaj
okuloj.

'6 Sub la boro de l' plumbaj
hajleroj ; Multaj falis kun
raŭka stertoro – ; Nekonataj,
sennomaj oferoj ; Al la blinda,
despota teroro.

'7 Per fluetoj la sango martira ;
Kolorigis la ŝtonojn pavimajn
; Dum viciĝis en kurba spaliro
; Bajonetoj, serĉantaj
viktimojn.

'8 Kaj okazis la murdo plej
bruta: ; La vunditojn trapikis
la ŝtalo, ; Kaj post unu freneza
minuto ; Venis kruda, ĉesiga
finalo.

'9 Kaj ankoraŭ post unu
momento ; Ĉion regis kadavra
silento, ; Nur ŝiritan kantadon
kun pento ; Ĉiam portis de ie
la vento.)

& Gala epistolo:

< Rekante 27 el 53 batoj por strofo, entute 371 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Nikolao Hohlov (La tajdo, 1928). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:53> (

/mimi fami mire redo doTi Ti La; mimi mire mifa soso soso so;
mimi fami mire redo doTi Ti La; dodo doLa dodo doTi TiLa La;

(#Rekantaĵo: mimi mi fa mimi mire re do do La; mimi mi fami mi
mire re do do Ti; mimi mi fa mimi mire re do do La)

)×7)+

(& Strofoj:

'1 /Morgaŭ vi alvenos pompe,
por ŝin preni ; Kaj en falsa
digno gvidi al altar', ; Kaj per
abomena via kis' veneni ;
Delikatan buŝon -- fonton de l'
nektar'.

(×: **Premu min forte al via
varma brusto ; Dolĉan
sopiras mi vian lipan guston
; Premu min forte al via
varma brusto.**)

'2 Morgaŭ oni poze, kun
nobelaj gestoj, ; Vin gratulos,
flatos burĝe kaj sen fin', ; El la
sinjorinoj en dekoltaj vestoj ;
Multaj nur envios, tre envios
ŝin.

'3 Longe mi rigardis vian
invitilon ; Sur papero silka,
kun orita rand', ; Kiu arlekene
fanfaronan brilon ;
Disreklamis kun la parvenua
frand'.

'4 Sed mi ĝin amare ĵetis en
kamenon, ; Kun kompat' al ŝia
estingita kor', ; Kaj al vi
emfaze sendis fi-malbenon: ;
Kelkajn virajn vortojn, galajn,
tra stertor'.

'5 Nur semajno pasis, kiam en
la tremo ; Ŝi min ĉirkaŭprenis,
kun infana lisp', ; Dum
volupta ardo, kvazaŭ diademo
; Kronis ŝian kapon supra hara
krisp'.

'6 Ho, ŝi estis dolĉo kaj fandita
belo, ; Kiam sinforĝese dronis
en la ĝu' ; La pasiaj lumoj --
fulmoj de l' ĉielo ; Sparkis kaj
radiis tra l' okula blu'.

'7 ; Nun ŝi estos via ... Ha ha
ha!!! Kadavron ; Vi aĉetas,
rano, per marĉanda mon'! ; Vi
imitas bufe novan
Minotaŭron, ; Sed ne via estas
de la am' burĝon'.

& La simio kaj la delfeno:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 372 paŝoj dum 5 minutoj. Poemon verkab Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956) baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado.>

(#Melodio:

<:31> (/mi mi dolre mi mi mido re fa; mimimi mimi mido re fa;
(#Rekantaĵe: mire do; do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mire
doTi La; So3mi mimi re do)
)×12)+

(&Strofoj:

'1 /Simio2n havis homo foje, ;
tre ofte kun ĝi ludis ĝoje,

(×: **En la ĉen' ; Dancu nun
trankvile ; Ĉiuj ni trankvilas
; Jen en amika ĉen' ; Dancu
nun trankvile.)**

'2 ĝin por amuzo kaj plezuro ;
kunportis eĉ dum marveturo.

.....

'3 Sed jen, tempesto
eksovaĝis. ; La ŝipo dronis.
Homoj naĝis.

'4 Dum la simio pene provis ;
elnaĝi, ĝin delfeno trovis,

'5 kaj, ĉar ĝi homo ĝin
rigardis, ; bonvole ĝian vivon
gardis,

'6 surdorsen prenis ĝin por
porto ; al seka kaj sekura
bordo.

'7 Nu, kiam ili al haveno ;
Pireo (rodo de Atheno)

'8 alvenis, la delfen' scivolis: ;
"Ĉu Athenano?" "Jes!" —
parolis

'9 tre fanfarone la simio, — ;
"eĉ el plej nobla familio!"

'10 "Do, vi Pireon konas
bone?" ; "Pireon? Certe, kiel
do ne?

'11 Li estas ja al mi tre kara ;
amiko, plej familiara!"

'12 Ko[lere] [pro l' men]sogo,
la delfeno ; droni[gis la
a]mikon de haveno.)

& Revina:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 372 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Cezar. Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado.>

(#Melodio:

<:31> (/mi mi dolre mi mi mido re fa; mimimi mimi mido re fa;
(#Rekantaĵe: mire do do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mire
doTi La; So3mi mimi re do)
)×12)+

(& Strofoj:

'1 Revina2 volus mare veli, ;
la tutan mondon tiel celi,

(×:; **En la ĉen', dancu nun
trankvile ; ĉiuj ni trankvilas
; jen en amika ĉen' ; dancu
nun trankvile.)**

'2 sed ĉar ŝi ne la monon
havas, ; ŝi hejme restas, reve
ravas.

'3 Se iam helpus al ŝi banko, ;
ŝi tuj forvelus kaj kun danko.
.....

'4 Ŝi lasus la amikon hejme, ;
lin adiaŭus senprobleme.

'5 Ŝi globotrotus sen
programoj, ; kaj montrus sin
en panoramoj.

'6 Ŝin viroj sekvus kiel muŝoj,
; sed ŝi elektus por ekkuŝoj.

.....

'7 Lastfine kantus ŝi en bando,
; revenus eĉ al la hejmlando,
.....

'8 kaj tie ŝi koncertojn donus –
; se la amik' ŝin ne
malspronus.

'9 Revina revas malgraŭ ĉio ;
pri juna dio for en Rio,

'10 sed hejme ne tro aĉe estas,
; kaj tial ŝi sengrumble restas.
.....

'11 Nu, hejme la amiko sidas, ;
kaj tiu ja Revinan bridas.

'12 "Revina, mankus al vi
sperto", ; li diras laŭte kaj kun
certo.)

& Hermes kaj la lignohakisto:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 377 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo tradukita de Leiva balado (Leivur Øssursson), disduiginte la versojn.>

(#Melodio:

<:29> (

/mi mimi reedodo doLa; dore miimimi mi; mildo dore redo doLa;
dore mimi mi;

(#Rekantaĵe: redo do dore mi; mire dore mimi; mimi mimi; redo
doLa do mi La a)

)×13)+

(&Strofoj:

'1 Faligis foje hakilon ; sian
lignohakist' ; e2n la riveron,
kaj post ; ĝi kun granda trist'

(×: **Paŝu firme sur plank'** ;
**ŝuojn trivu ankaŭ, ; regu
dio, ; kie dancos ni sen
mank'.**)

'2 rigardis sur la bordo. ;
Hermes dum preterir' ; ekvidis
lin, demandis: ; "Kial la
suspir'?"

'3 Kaj, kun kompato scii;ĝinte
pri l' afer' ; li orhakilon portis
al ; li el la river':

'4 "Ĉu estas via?" "Ho, ne" —
; estis la respond' . ;
Arĝenthakilon nun li ; levis el
sub ond':

'5 "Ĉu via?" "Ne." Li portis ;
je la tria foj' ; la lian. Tiun nia
; homo kun ega ĝoj'

'6 rekonis, kaj la dion ; kore
dankis li. ; Donacis Hermes
tiam ; al li ĉiujn tri.

'7 Feliĉe la homo iris ; for, kaj
ĉe l' renkont' ; al la kunuloj
gaja ; estis lia rakont'

'8 pri l' incident' agrabla: ; La
perdo de hakil' ; fariĝis por li
granda ; gajno kaj util'.

'9 [Unu el] la kunuloj,
avi;dega enviul', ; sopiris
gajnon saman, ; tial sen
skrupul'

'10 li iris al la rivero, ; en ĝin
ĵetis mem ; hakilon sian kaj
la;mentis inter ĝem'.

'11 Nu, ankaŭ lin ekvidis ;
Hermes dum preterir', ; kaj
same lin demandis: ; "Kial la
suspir'?"

'12 Kaj same, kiam li sci;igis
pri l' afer', ; li orhakilon portis
al ; li el la river'!

'13 "Ĉu via?" "Jes!" — avide ;
kriis la homaĉ'. ; Malaperis
dio, hakilo, ; restis la domaĝ'.
.....)

& La aglo kaj la vulpo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 377 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per feroaj melodio kaj rekantaĵo tradukita de Leiva balado (Leivur Øssursson), disduiginte la versojn.>

(#Melodio:

<:29> (a;mi /mimi mimi redo do;La dore mimi mimi; miidodo dore redo do;La dore mimi mimi;

(#Rekantaĵe: redo do dore mi; mire dore mimi; mimi mimi; redo doLa do mi La)

)×13)+

(&Strofoj:

'1 La /aglo foje kun la vulp' ;
federis sin amike, ; kaj por ke
ĉi amika lig' ; firmiĝu pli
fortike,

(×: **Paŝu firme sur plank'**, ;
**ŝuojn trivu ankaŭ, ; regu
dio, ; kie dancos ni sen
mank'.**)

'2 ili loĝiĝis en proksim': ; La
aglo neston plektis ; sur alta
arbo, dum la vulp' ; arbuston
por si elektis

'3 sub tiu sama arbo kaj ; la
idojn tie kaŝis. ; Sed foje,
kiam el la hejm' ; al kampo ĝi
forpaŝis,

'4 la aglo, manke de manĝaĵ', ;
alflugis, rabe prenis ; la
vulpidetojn, kaj kun la ;
aglidoj manĝfestenis.

'5 La vulpo post la hejmenven'
; sciiĝis pri l' perfido, ; la
aglon malbenegis, sed ; ĉi tiu
kun mokrido

'6 respondis per orgojla kri': ;
"Al mia alta nesto ; neniam
via kolereg' ; atingos, rampa
besto!"

'7 La vulp' lamentis:
"Mankas,ve, ; flugpovo, kaj
mi sen ĝi ; ne estas ja kapabla
la ; flugantan birdon venĝi.

'8 Nenio por mi restas krom, ;
en mia kolerbrulo, ; malbeni,
kiel faras al ; potenca
perfortulo

'9 senhelpaj kaj malfortaj, kaj ;
toleri pacience." ; La aglon
tamen trafis pun' ; pro tio, ke
atence

'10 la ligon de la amikec' ;
ekrompis ĝi, perfida. ; Altaro
staris kampe, kaj ; la oferaĵ'
kaprida

'11 jam brulis, kiam el la alt' ;
la aglo sin alĵetis, ; ĝin kaptis,
portis al la nest'. ; Sed vento
ekimpetis,

'12 la nesto per ardaĵa karn' ;
ekflamis, brulis, falis ; kun la
aglidoj. Kuris tuj ; la vulpo,
sin regalas,

'13 manĝante ilin antaŭ la ;
okuloj de la aglo. ; La justo
tiel venkis per ; hazardo aŭ
miraklo.)

& La lasta fablo de Ezopo:

< Rekante 20 el 29 batoj por strofo, entute 377 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo islandaj de Olav Rajdistrozo, movante versojn inter strofoj '1-'2 kaj '5-'6 pro rimoj.>

(#Melodio:

<1,6:29> (/soso doso sola soso; mifa so mire do; soso soorelmi fami do[do;mifa] soso sofa milso; soso lalalaa sofa mire do dore; mire mimifaa soso lafa mi re do o)×13)+

(&Strofoj:

'1 Estis kamparano aĝa.

(×:: **Se erar', li en star'** ;)

En la kabanet' vilaĝa

(×:: **Kaj la ruĝa brulis
fla2m'. ; Milde ŝarĝon li
metis sub la montkruto ;
milde ŝarĝon li metis sub la
monta krut'.)**)

'2 li jam manĝis multajn
bulbojn, sed neniam vidis
urbojn,

'3 do li petis la domanojn:
“Mi jam manĝis multajn
panojn

'4 sed ne lasis for ĉi neston,
..... donu al mi rajdobeston.”
.....

'5 Nu, azenon li ricevis,
sin en ties selon levis,

'6 kiu jam kaduke aĝis, al
la urbo ekvojaĝis.

'7 Rajdis sur la lanta besto,
sed atakis lin tempesto.

'8 La azeno time prancis,
la aĝulon ĝi balancis,

'9 fine levis sin subite sur
la postajn krurojn, puŝis

'10 lin en foson. Tie kuŝis
la povrulo, mortvundite.

'11 Kaj li veis, jam apenaŭ
spiretante. “Se almenaŭ

'12 mi de rajdĉeval' bonrasa
..... mortus, aŭ de mul' tenaca,
.....

'13 kaj ne de azen' nazmuka,
..... malkuraĝa kaj kaduka!”
.....)

& La prognozo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 377 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por La plej granda kulpulo.>

(#Melodio:

<:29> (

/La dore mi mi mire fare mi do;do dodo redo dodo doLa do Ti;

(#Rekantaĵe: La dore mi mi re falre mi; doTi reTi do Lado Ti Ti La a)

)×13)+

(&Strofoj:

'1 En lito kuŝis malsanul' inerte. ; Konsolis ĉiuj: "Vi saniĝos certe."

(×:; **Venu mastrino en la2 ĉen' ; Prenu mian manon en firma ten'.**)

'2 Sed venis kuracisto kaj decide ; deklaris: "Vin ne trompu erarfide!

'3 Domaĝe, vi ne vivos ĝis mateno." ; Post tio li foriris sen reveno.

'4 Sed tiu tamen el la grava stato ; iom post iom elsaniĝis plene,

'5 kaj post monato iris al la strato ; palvange kaj malforte, sed serene.

'6 Jen, venis kontraŭ li la eskulapo, ; kaj, ege surprizite ĉe l' renkonto,

'7 ekkriis dum la skuo de la kapo: ; "Ej! Ĉu vi do revenis de l' Submondo?

'8 Kio do estas tie?" Paciento ; lia respondis: "Paco kaj silento.

'9 La asfodeloj kreskas en abundo, ; balzamon donas Lethe al korvundo,

'10 sed ... lastatempe, tamen, tre agacas ; Plutonon, ke tro bone jam kuracas

11 la kuracistoj; barko de Ĥarono ; malplene pasas do tra Aĥerono.

'12 Kolere nun li prenas en
registron ; de ĉiuj kuracistoj la
nomliston.

'13 Ne timu tamen! Mi kun
ĵurinsisto ; konfirmis: Vi ne
estas kuracisto.")

& Mortinto:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 377 paŝoj dum 6 minutoj. Poemon verkis Frigyes Karinthy. Baladigis Martin Strid per melodio kaj rekantaĵo de Balado de Virgar, Norda Kantaro #4406.>

(#Melodio:

<1,3:29> (

a;La /MiiLaLa LaaTiTi Tiidodo doore;re reedodo dooTiTi
TiiMi;Mi LaaLaLa TiiTiTi TiiTiTi doore;re reedodo dooTiTi
LaTi;

(#Rekantaĵe: do TiLa So Ti Mi LaTi do do;Mi So SoFa Mi La;Ti
doTi La)

)×13)+

(&Strofoj:

'1 Vi/vanton per frukto regalias
somero, ; Per vino regalias la
vintro. ; Sed scias mi, kiel
mortinto sin nutras: ; Per
larmoj sin nutras mortinto.

(×:; **Nun emas mi en danco
jam iri ; dum rozoj, lilioj ;
kreskadas tre.)**

'2 Jes. Kuŝas mortinto sur
fundo de tombo, ; Kie estas
nek frostoj, nek varm', ; Vizaĝ'
lia flavas, okul' lia kavas, ; Li
kuŝas, atendas je larm'.

'3 Kaj kuŝas, atendas: ĉu iu
jam plendas, ; Kaj kuŝas,
atendas sub humo. ; Nek
dankon li konas, nek petis, nek
donas, ; Lin logas nek sun',
nek lunlumo,

'4 Nek memor', nek esper' nek
fora pejzaĝo, ; Nur la griza
larmsuko, grandkvante. ;
Kiam krakas la branĉoj kaj
zumas la arboj, ; Kaj spasmas
la gorgo pulsante.

'5 Kiam ŝmacas la tero,
vekiĝas silento, ; Sekiĝas la
osto en kaŝo, ; La osto, la
kruda, atendas je l' nuda ;
Barakta, vivanta molaĵo.

'6 Ĉar sciu: se kurbas la buŝo
je ploro, ; Li plezuras kun ĝoja
ridaĉ', ; Dum plor' ne forgesu
sub molaj vizaĝoj ; Pri l' rid'
malica de l' ostovizaĝ'.

'7 Ho, kiom mi ploris! Jam
tede! Per larmoj ; Mordiĝis la
koro en Brust', ; Kiel la
supraĵo de aĝa kupraĵo ; Per
pigra verdaĵo de rust'.

'8 Mi ploris, kie neniu min
vidis, ; En aĉaj, malpuraj
anguloj, ; Ĉar naŭzas ja min,
kaj abomenigas ; Poltrona
ploraĉ" de l' okuloj.

'9 Sed se vi pli volas, nur
signu, mortinto, ; Ne ĉesis
festeno, ~~plu daŭras~~ regal', ; Se
sekos okule la akvo, mi donos
; Ja sangon kaj salon, ~~aceton~~
kun gal',

'10 Disfluos mi larme,
sorbiĝos en teron, ; Se tion vi
volas, mortinto, ; El ter' mi vin
lavos, el ter' vin elfosos, ;
Elvolvos mi vin el tol-vindo,
.....

'11 Kaj kun vi ekiros la larmo-
rivero, ; Ekŝvelos malpure la
flu', ; Tra l' mur' kaj tombar' la
rivero sovaĝa ; Inundos,
galopos ĝi plu.

'12 Denove diluvo englutu la
teron, ; Ne restu insulo sen
mergo, ; Kaj supre de l' akvoj,
sur ŝaŭmo de l' akvoj ; Arke'
de Noah': via ĉerko!

'13 Mortint', ho mortint', vi,
patrin', amatin', ; Edzino,
infano, homfrato! ; Elpaŝu el
barko kaj sendu mesaĝon, ;
Kiam bordos vi sur Ararato.
.....)

& Kulureporko:

< Ripete 13 sed rekante 9 el 21 batoj por strofo, entute 378 paŝoj dum 6 minutoj. Norda Kantaro #4496. De la provinca limregiono inter Vestmanlando kaj Dalekarlujo. El sveda tradukis Kukoletto (oe) kaj Martin Strid (strofon '12b, 2015). Klarigoj (*): '1 Loj = ili. '8 Vizaĝo: homo.>

(#Melodio:

<1,2:21> (

o;So /do3re mido falmi re falmi re;So do3re mido solfa mimi
solfa mi;So do3re mido fami rere fami redo SoTi do

)×18)+

(&Strofoj:

'1 /Estis kampara2no, -ra2no, ;
kaj havis li porke2ton,
porke2ton ; Loj* nomis ĝin
Kulurepork', Kulurepork',
Kulurepork',

'2 La porko havis (': ka2pon,)
(,: ka2pon, ;) sufiĉan por (':
kaba2no,) (: kaba2no ;)

(×: Loj nomis ĝin
(Kulurepork',)×3)

'3 De l' porko jam la trunko
nur videblis super templa
tur'

'4 La porko havis pie2dojn
ke homoj emis ce2dojn

'5 La porko kreskis ki[el
in]und' porkejon stamfis al
la grund'

'6 Stokejon iris da farun'
kaj manĝis la porko je tuta tun'
.....

'7 La porko fosas en agra
kamp' Kampulo jen en
tima kramp'

'8 La porko ekstaris en vilaĝ'
..... Arbaren fuĝis ĉiu vizaĝ'*
.....

'9 La porko iris sur blua mont'
..... videblis ĝi de ĉiu front'

'10 La porko staris sur monta
rand' Ĝin vidis tuta sveda
land'

'11 Rajdisto venis rajda2nte
..... kaj la porko venis kria2nte
.....

'12a La glavon tiris li de l' uj'
..... mortpikis tiun porkon tuj
.....

'12b La glavon tiris li de l' ing'
..... mortigis tiun porkon sving'
.....

'13 La porko blekis, sanga
ŝpruc' dek kvin barelojn
kaj grandkruĉ'

'14 Li trenis la porkon al la
hejm' Kvin tagojn ĉion
faris mem

'15 Loj metis la karnon en
tinojn kun sal' kaj tamen
restis pli en hal'

'16 Kuiris bulkojn el la sang'
..... Finfrandis vilaĝana lang'
.....

'17 Ja mortis fine Kulurepork'
..... Ĝin manĝis ĉiuj bone per
fork')

& Balado pri soldato:

< Ripete 12 el 33 batoj por strofo, entute 381 paŝoj dum 4 minutoj. El ĉeĥa(?) tradukis Vladimír Türk.>

(#Melodio:

<:3> (

/Sodo mire doTi /do olre mi; / reso soso sola /mi i h; /refa laso fare /milfa lmildo So; /LaLa mire doTi /La h Ti /do h re; /mimi mire doTi /La a h

)×11)+

(&Strofoj:

'1 /Dum min oni solda/ti2gis, ;
/surteriĝis mia /har' ;
/stultulega mi as/pe4ktis, ; (':
/kiel ĉiu en la /ar') (, : , ar', /ar;
-ar', ; /kiel ĉiu en la /ar'.)

'2 Oni fermis min kazerne ;
ekinstruis al milit' ; por ke mi
pro la patrujo ; sciu morti sen
hezit'

'3 Rigardante en la muron ;
post la enlitiga hor' ; mi
imagis amatinon ; kaj ekploris
pro amor'

'4 Pneuĉmonion mi suferis ;
ĝuste dum ŝia alven' ; iu bruis
koridore ; vana estis mia pen'
.....

'5 Ore brilis epoletoj ; ĉe l'
kazerna elirej' ; ŝi foriris kun
majoro ; ekaŭdinte pri loĝej'
.....

'6 Ŝi ne kulpis ja pri tio ;
larmon kaŝu la okul' ; ĉiu ino
ja bezonas ; ke ŝin amu iu ul'
.....

'7 Kiu zorgas pri soldato ;
forlasita de knabin' ; Fraĥna
Ŝamek, ĝis revido ; venis jam
de l' kanto fin' ; kiel ŝi amuzis
vin ; mi iome fuŝis ĝin.)

& La nigra rajdanto:

< Rekante 16 el 32 batoj por strofo, entute 384 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis K. Kalocsay (Streĉita kordo, 1931). Baladigis Martin Strid (2016) per feroaj melodio kaj rekantaĵo de & Olav Rajdistrozo.>

(#Melodio:

<2,3:4> (o;mi /mi mi mi mi /so solfa mi i; /soso sofa mi i;mi /mi mi re re /mi milre do lTi; /LaTi dore mimi mire; /dodo dore mi mire /do Ti do)×12)+

(& Strofoj:

'1 Ĉe l' /vojo: fulga /trab' de2 dom',

(×:; – /**Karbo kaj forĝist'** – ;)

Post /arb' rikanas /ostfa2nto2m'.

(×:; /**Junaj viroj, viglaj viroj!** ; /**Iru plankon, dancu kun /granda em'!**)

'2 En la plumbe peza noktsilent' Nur foje ĝemas branĉo pro vent'.

'3 Kaj en droniga glua kot' Jen kuras en freneza trot'

'4 Ĉevalo nigra tra l' malhel', Rajdanto nigra en la sel'.

'5 Ĉe l' vojo: fulga trab' de dom', Post arb' rikanas ostfantom'.

'6 Sub kasko: vizaĝ' en morta pal', En sango glitas huf' de ĉeval'.

'7 "Rajdanto! Kien la rapid'?" Respondas moke raŭka rid'.

'8 "Rajdant'! La hejmo jam ruin'! Rajdant'! Revokas vin patrin'!

'9 Rajdant'! Postploras vin infan'!" "Forblovas flokojn uragan'!"

'10 "Sed kia cel', do kia cel'?" Respond' ne venas el la sel'.

'11 Klinita kap', freneza trot', En drona, glua, sanga kot'

'12 Glitadas hufo de ĉeval' Okuloj vitraj, morta pal'.

& La Reveno de l' Filo:

< Rekante 16 el 32 batoj, entute 384 paŝoj dum 2 aŭ 3 minutoj.
Verkis Antoni Grabowski. Baladigis Martin Strid (2016) per
feroaj melodio kaj rekantaĵo de Olav Rajdistrozo, disduigante la
strofojn.>

(#Melodio:

<2,3:4> (

/mi mi mi mi /so solfa mi i; /soso sofa mi i; /mi mi re re /mi milre
do lTi; /LaTi dore mimi mire; /dodo dore mi mire /do Ti do o

)×12)+

(&Strofoj:

'1 /Post foresto /multe2jara
(×:; /**Karbo kaj for/ĝist'** ;)
/Venas filo /mia2 kara; (×:;
/Junaj viroj, viglaj viroj! ;
/Iru plankon, dancu kun
/granda em'!)

'2 El migrado ĉiulanda
Venas filo mia granda!

'3 En kabano mankis pano,
Do elmigris li, infano;

'4 Nun revenas beljunulo
Al hejmlando, al Vistulo!

'5 Kiel volus mi, patrino,
Premi lin al mia sino;

'6 Doni volus mi festenon,
Por saluti la revenon.

'7 Ve! ne mastras mi kabanon,
..... Nek liberan havas manon;
.....

'8 Mi, en mia propra domo,
..... Estas kvazaŭ fremda
homo.

'9 Ĉar al vi, fratin' pli aĝa,
Post kamplimo hejmvilaĝa,
.....

'10 Brilas, laŭ destino dia,
Stel' alia, pli radia —

'11 Do akceptu lin, fratino,
Per muziko kaj per vino!

'12 Li ne vidu ĉe l' festeno,
Kiel premas min — ĉagreno.
.....)

& Enuo laborista:

< Rekante 24 el 55 batoj por strofo, entute 385 paŝoj dum 5 minutoj. Poemon verkis G. Lagrange (nica literatura revuo 7/5 (n-ro 41) p. 165). Baladigis kaj komponis Martin Strid.>

(#Melodio:

<:55> (

a;mi /mimi remi fa sofa mi reedore miido;do mimi rere mi fami
rere dore mimi; miimimi remi fa sofa mire dore miido;do mimi
remi fa solfa miimire doTi LaLa;

(#Rekantaĵe: So SoSo dore mifa mire mido reLa; So LaTi doTi
LaFa SoSo Ti i; dodo miirere do Tido La; So SoSo dore mifa mire
mido reLa)

)×7)+

(&Strofoj:

'1 Ma/tene ci gluiĝas al mi,
kiel la ŝlimo, ; enuo,
vivomastro kaj reĝo ĉiopova, ;
kiun kapablas venki neniam io
nova; kaj sentas mi tuttago2n
guston de cia ŝimo.

(×: **Ĉendanco estas lumo en
ekzisto nia ; Dancu ekstazon
en komuna tret' ; Kantu
gaje kun tondra impet' ;
Ĉendanco estas lumo en
ekzisto nia.**)

'2 Enuo senkuraca de l' grizo
ĉiuhora, ; ne tiu multekosta de
vivo tro malplena, ; nek tiu
romantika de menso riĉe
splena: ; sed tiu de l' realo,
eterne lacodora.

'3 Kiel azen' karoton sekvas
kaj ĉaron trenas, ; en
postkurad' absurda al
estonteco hela, ; kaj daŭre
baraktante en la mucido kela, ;
mi tiel stultan vivon plu tiras
kaj eltenas.

'4 Perdiĝas viglaj jaroj en
taskoj de abelo, ; en vanaj
necesaĵoj, kiuj nomiĝas devoj,
; dum fuĝas vera vivo,
forflugas altaj revoj ; kaj ĉio
interesa, ĉiam por tuja celo.

.....

'5 Ripozaj horoj, paŭzoj kaj
tempoj sunferiaj ; pasas
vaporaj kiel matennebul'
surlaga, ; sed ne plu forgesiĝas
la kruda ĉiutaga ; kaj peza
jungiteco ĉe l' zorgoj materiaj.

.....

'6 Enuo pro l' kunhomoj kun
etanima klaĉo, ; enuo pro l'
fremdeco al mondo tro
maljusta, ; enuo pro okupo
banala kaj sengusta, ; enuo pro
l' vulgaro de l' vanta babilaĉo.

.....

'7 Senlima, monotono, enuo
mare vasta, ; enuo, kiun amo
momenton nur forŝminkas, ;
indiferent', en kiun ĉia vivemo
sinkas, ; kaj kiu finsopiras al
nenieco lasta... ..)

& Ŝipisto kaj junulino:

< Rekante 19 el 35 batoj por strofo, entute 385 paŝoj dum 5 minutoj. Norda Kantaro #4444. El sveda tradukis Martin Strid (2015).>

(#Melodio:

<:35> (do /SoSo dodo /LaLa Tido /re SoSo /do; LaLa /SoSo FaFa /Mi; do /SoSo dodo /La Tido /rere SoSo /do; LaLa /So FaFa /Mi; DoMi /SoLa FaSo /Mi So;So /do remi /falmi redo /Ti do)×11)+

(&Strofoj:

'1 Ju/nunjo iris /akvon preni
/ĉe mara /strand'

(×:: **Aŭdu /mia ami/ke'** ;)

kaj /venas jen ŝi/pisto de
/fremda ekster/land'

(×:: **Tagne/bul', falas /pluv' ;
Ne tag/iĝas nun an/koraŭ ;
sed /tamen ta/gi2ĝas
dum/tempe.)**

'2 Jununjon en la sinon prenas
tiu ŝipa vir' kaj ŝipe al la
fremda lando estas nun la ir'

.....

'3 "Ho kara vi ŝipisto, min
relasu al terlanĉ' ĉar hejme
ploras la infanoj kaj mia
fianĉ'"

'4 "Kaj vidas mi je junulina
flava harar' ke sur tiu
neniam estis nuptokrona star'

.....

'5 Kaj tamen vidas mi je
junulina eta fingr' ke sur
tiu neniam estis iu nupta ring'

.....

'6 Ne venos junulino re al
patra bien' ĝis ŝi ricevis
knabon kiu ŝipon stiros jen

'7 Ne venos junulino re al
patra bien' ĝis naskis ŝi
knabinon kiu kudros per
silkfaden'"

'8 Jununjo sur ferdeko iras en
ridet' kaj plor' kaj ĵetas sin
en ondan profundon de l' mar'

.....

'9 Kaj ŝipis la ŝipisto kaj naĝis
junulin' kaj junulino al la
tero antaŭis lin

'10 Kaj de si li forĵetas
marjakon la bluan kaj sube
'stis mantelo kun silkaj la
ŝnuroj

'11 "Ne estas mi ŝipisto,
kvankam kredas junulin'
mi estas la plej bona
anglalanda reĝofil'")

& La avarulo:

< Rekante 32 el 65 batoj por strofo, entute 390 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2016) per modifitaj melodio de skandinava dancludo kaj ĝia rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,8:> (/so sola sola soso sofa mi mi;mi fa fami re remi so solfa mi mi;mi so la so la soso sofa mi mi;mi fa fa fafa rere TiTi re e do h

(#Rekantaĵe: so sola so la soso sofa mi i; fafa fami re e soso sofa mi i; so sola so la soso sofa mi mi; fa fafa re Ti re e do h

)×6)+

(&Strofoj:

'1 /Ĉiun havaĵon vendis avarulo, ; la tutan por ĝi ricevita2n monon ; li ŝanĝis je grandega ora bulo, ; kaj ĝin enfosis sub la bastionon.

(×:; **Tiel ni iras ĉirkaŭ juniper'**, ; **ĉirkaŭ juniper'**, **ĉirkaŭ juniper'**. ; **Tiel ni iras ĉirkaŭ juniper'**, ; **dum ĉiu frumateno.**)

'2 (Poste konstante tien li reiris, ; la oron li rigardis kaj admiris. ;)×

'3 Sed homoj faris en ĉi lok' laboron, ; la pilgrimado sen

rimark' ne restis, ; unu konjektis ion, kaj la oron ; forŝtelis, dum la avarul' forestis.

'4 (Revenis li, ne trovis sian karon, ; lamentis, veis, ŝiris la hararon. ;)×

'5 Demandis iu, kial la turmento, ; kaj sciiĝinte diris ĉi admonon: ; “Neniel tristu, ĉesu la lamento, ; jen prenu kaj enfosu do ĉi ŝtonon,

'6 (rigardu kiel tiun oro-pecon. ; Ĝi ne pli havis por vi utilecon.” ;)×

& La balado Espero:

< Rekante 31 el 65 batoj por strofo, entute 390 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis L. L. Zamenhof (1887). Komponis F. de Menil. Baladigis Martin Strid (2016) per disduigo de strofoj kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,75:> (So3So /So Mih do3So mi3do /so o mih; So3do /mi doh so3mi mi3re /re e doh; So3So /So Mih do3So mi3do /so o mih; Ti3mi /so mih so3fi mi3ma /fi i mih;

(#Rekantaĵe: mi3mi /fa La TiTi dore /So o Lah; La3La /Ti do re3re ri3ri /mi i fah; So3So /So Mi do3So mi3do /so o fah; fa3fa /mi Soh mi3re fa3Ti /re e do oh)

)×6)+

(& Strofoj:

'1 En la /mondon venis nova /sento ; tra la /mondo iras forta /voko ; per flu/giloj de facila /vento ; nun de /loko flugu ĝi al /loko

(×: **Nun mi /volas danci kun a/mikoj ; kaj sur/paŝi plankon en ĉi /rondo ; kaj pro/funde ĝis niaj ra/dikoj ; volas /vivi kun la tuta /mondo.)**

'2 Ne al /glavo sangon soi/fanta ; ĝi la /homan tiras fami/lion ; al la /mond' eterna mili/tanta ; ĝi pro/mesas sanktan harmo/nion.

'3 Sub la sankta signo de l' espero ; kolektiĝas pacaj batalantoj ; kaj rapide kreskas la afero ; per laboro de la esperantoj.

'4 Forte staras muroj de miljaroj ; inter la popoloj dividitaj ; sed dissaltos la obstinaj baroj ; per la sankta amo disbatitaj.

'5 Sur neŭtrala lingva fundamento ; komprenante unu la alian ; la popoloj faros en konsento ; unu grandan rondon familian.

•
'6 Nia diligenta kolegaro ; en
laboro paca ne laciĝos ; ĝis la
bela sonĝo de l' homaro ; por
eterna ben' efektiviĝos.)

& La griloj:

< Rekante 16 el 32 batoj por strofo, entute 394 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo feroaj de Olav Rajdistrozo.>

(#Melodio:

<2,3:4> (

/mi mi mi mi /so solfa mi i; /soso sofa mi i; /mi mi re re /mi milre do Ti; /LaTi dore mimi mire; /dodo dore mi mire /do Ti do o)×...)+

(&Strofoj:

'1 Antaŭ la naskiĝ' de 2 l' karaj
(×:; – /**Karbo kaj forĝist'** – ;)

Muzoj, laŭ la oni 2 diroj,

(×:; /**Junaj viroj, viglaj viroj!**
; /**Iru plankon, dancu kun**
/**granda em'!**))

'2 homoj estis ordinaraj,
ankaŭ la kamaraj griloj.

'3 Sed kiam aperis Muzoj,
kaj por dolĉaj kor-amuzoj

'4 la unuaj kantoj sonis, la
gril-homoj tiel dronis

'5 en plezur', ke ili ĉesis
pri si zorgi, eĉ forgesis

'6 manĝi, trinki, kaj konstante
..... kantis nur, ne rimarkante,
.....

'7 kantis nur, ne rimarkante,
..... ke per tio ili lante

'8 sin mortigas. Ili devis
morti home, sed ricevis

'9 grilan korpon, plu kanzonis,
..... al ili la Muzoj donis

'10 la donacon, ke dumvive
..... senmalsate, sensoife

'11 ili kantu, kaj post morto
..... ili iru kun raporto:

'12 Kiu do la Muzojn tere
kultas kaj honoras vere.
.....)